


Manufacture générale des Papiers d'Angoulême. — (TONGIMED)


ANGLETERRE
DE LA MANCHE
Pas de Calais
BELG
EMAGNE
1r Arrond'.
maritime
PAS-DE-CALAIS
SOMME
SEINE-INF.
AISNE
ARDENNES
Boulogne
Calais
Amiens
Rouen
Mons
Mézières
Laon
Compiègne
Bruxelles
Coblentz


ANGLETERRE
Bruxelles
Calais
Boulogne

# Vespero en Arabolando (El. Alph. Daudet)

Tio estis en Alĝerujo, ĉe potenca araba estro de "Altaj-Platajoj"

El la granda landsinjora tendo starigita por ni antaŭ la arabestra domo, ni vidis alfali duonfunebran nokton, violnigran, en kiu malpaliĝis la purpuro de belega sunsubiriĝo. Malvarmeta estis la vespero; ĉe la mezo de la tendo, duone malfermita; oni vidis kabilan kandelingon palmaligne farita, kies branĉoj superitaj de tremaj flametoj altiris multon da noktaj insektoj, flugetantaj kun flugila brueto

Ĉirkaŭe, tersidiĝinte sur matoj, silente ni manĝis; tio estis tutaj ŝafoj disfluantaj je butersuko, kiujn oni alportis per pinta stango, kukaĵoj kun mielo, konfitaĵoj parfumitaj, kaj fine granda ligna plado sur kiu blankaj kaj molaj kokidoj estis kuŝitaj inter la orumita tritikaĵo de l'kuskuso (nacia araba manĝaĵo)

Dum tiu tempo noktiĝis. Super la ĉirkaŭaj montetoj la luno aperis per malgranda kvaronluno en kiu steleto estas enfermita. Ekstere antaŭ la tendo flamegis granda fajro ĉirkaŭita de dancistoj kaj muzikistoj. Tie estis grandega negrulo, tute nuda sub malnova milita kapoto, kiu freneze saltegis, resendanta pro la fajroklareco, supermezurajn fantomojn sur

la tendtolon.

Ĉiu sovaĝa dancado, tiuj tiaj tamburetoj spiregantaj
la trorapida takto, la akrasonaj bojoj de ŝakaloj ki
respondis unuj al la aliaj sur la tuta ebenaĵo, ĉio
povis kredigi ke ni estas en vera kaj malproksimega
sovaĝlando.

~~Dum tiu tempo~~ Tamen, interne de la tendo, tiu
loĝejo de migrantuloj, kiu ŝajnas velon sur sennova
maro, la arabestro, majeste envolvita en siaj lanaj
burnusoj (arabaj manteloj) grave finis kune kun
sian manĝon.

Poste, la fajro estingiĝante, la muziko ĉesis.

Kaj tiam, reenirante en la domon, la gastaro
kuŝiĝis sur maldikajn arabajn matracojn, kie, laciĝ
kaj impresita de tiuj vidaĵoj novaj kaj nekonataj de
mi novalĝeriano, mi ekdormis en strangaj aperaĵ

## Kritaj

Anekdoto presita en la Gazeto (Alĝeria Stelo). …an de Junio 190

Por kunhelpi al la sukceso de tiu ĉi revueto, k
tiel daŭrigi la propagandon por la lingvo Esperanto, mi
sendis al multaj ĉiulandaj gekorespondantoj, ekzemple
da ĝi, kiujn mi estis ricevintaj de la redak~~ti~~taro

Kelkaj el tiuj korespondantoj bonvolis aboni; aliaj petas senkulpigon ĉar tion ili ne povas fari pro tiu aŭ alia kaŭzo; ĉiuj afable min dankis. Multaj el ili resendinte, interŝanĝe, esperantajn revuojn el sia lando, (pro kio miavice tre dankas ilin) tio al mi memorigas la ŝercan fakton jenan:

Dum mia juneco (feliĉa tempo jam iom malproksima) mi ~~aliĝis~~ aniĝis al muzika societo, kredeble kiel multaj el vi, ĉu ne vere karaj legantoj? Pli aŭ malpli, iam ĉiuj ni blovis en ian muzikilon.

Tiu muzikantaro havis kutimon, la tagon antaŭfestan ~~la festo tago~~ de ĉiu el siaj anoj, alfari serenadon antaŭ la domo de l'festato.

Tiu ĉi, ĉiam zorge antaŭsciigita, gaja ekaperis ĉe l'fenestro, poste malsuprenirante li petis ke ni eniru en lian loĝejon. Tie, kantante, deklamante, muzikante, kriante kaj precipe ridegante, ni trinkis kaj retrinkis ĉiuspecajn trinkaĵojn, meze de granda bruo pligrandigata per la eksplodbruo de l'korkoj de ĉampanboteloj.

Iun tagon, alvenis la festo de nia nova cimbalisto, maljuna fraŭlo, eksregna oficisto, bonvivulo ĉiam gaja kaj kontenta. La muzikantoj senbrue antaŭeniras ĝis lia domo kaj — unu, du, tri, kvar — subite

eksonegas en la nokto, muzikaj kaj kupraŝonaj eĥoj.

Nia amiko nur vestita per noktaj ĉemizo kaj kapvesto, tuj malfermas sian fenestron, kie li apera kun surpriza mieno; kaj tuj kiam la ario estis fin li ekprenis siajn cimbalojn, kaj ilin batadis per rapidegaj batoj unu kontraŭ la alian, dzin-dzin dzin-dzin-dzin ...., dzin-dzin-dzin-dzin-dzi dzin.... dzin...; fine haltante kaj kliniĝant al ni, li ekkriis fortavoĉe: « Nune, ni estas kvitaj, kaj li reeniris refermante vitrojn eĉ fenestrajn kovrilo

La bruega rideksplodo kiu daŭris de la tempo kiam komenciĝis tiu ridinda sceno, tuj ekpligrandiĝ ĉe l' fenestroj de la ĉirkaŭaĵo, kie troviĝis amaso d loĝantoj, sed iom post iom ĝi haltis malsupre, kie la muzikantoj, certe atendis ian neeviteblan ŝercon, sed ne, tiel tutan mistifikon.

Sola nia tamburisto, eksregimenta tamburisto, drin-emulo enradikita kaj portisto kiam li povis, ne malesper certigante ke li alportis ĵus hodiaŭ, du korbojn da ĉampanvino al nia kolego. Tial, ĉar la situacio daŭradis, li ekdonas perfortan ŝultrobaton al la por kiu malfermiĝis sen ia malcedo; kaj tiam okazis vera enpenetrado en la domon de l' cimbalisto.

Sed, kia ĝojiga surprizo kiam, supreniriante

ni ekvidis grandan manĝotablon ŝarĝitan de lumingoj floroj, frandaĵoj kaj trinkaĵoj; kaj sur la sojlo, nian amikon, korekte frakvestitan kiu, tute ridetante, amikege ricevis nin en sian hejmon.....

Do, la vesperkunveno, aŭ pli ĝuste la noktkunveno, bonege kaj ĝojege finiĝis, sed longatempe oni ridis, oftege ripetante: «Nune ni estas kvitaj.»

Vi vidas ke eĉ nuntempe, oni ĝin ne ankoraŭ forgesis.

## Ambicia sed senpripensa

Oni anoncis Abaton Bernard kaj tuje aperis juna pastro belkreska, freŝe razita, zorge kombita, kies kolumo iom tro superanta, kontrastis per sia senmakula blanko sur lia vizaĝkoloro iom flava, de brunulo.

Li trairis la salonon per senĝena marŝo kaj sufiĉe granda ŝajno, balanciganta sian pastran veston kaj la silkajn franĝojn de sia rubandzono tute same kiel romana altrangulo.

Li direktis sin al la subprefektedzino, ĝentile riverencis antaŭ ŝi kaj alparolis ŝin: «Sinjorino, de mallonge nomita vikario ĉe via urbo, mi eksciis ke

hodiaŭ estas la tago kiam vi akceptas gevizitantojn, ka
devo estas respekte saluti la edzinon de la plej altg
riprezentanto en tiu ĉi urbo de mia registaro."

Ĉiuj paroloj, kvankam parkere ellernitaj, ne
malbone diritaj kaj ili tuj altiris la simpation de
kunvenaro.

La ĉeestantaj sinjorinoj, kies natura scivemo e
incitata de tia vizitanto, komencis elmontri iojn s
de sia aprobo, de sia kontentiĝo, kiuj pligrandiĝ
ankoraŭ kiam la subprefektedzino siavice ekpa

Ja, tre afable ŝi respondis al la juna abato,
gratuloj pro liaj konataj nuntempaj ideoj, dank
pro lia neatendita vizito, kaj multaj bondeziroj
bonveno

Poste ĝenerala fariĝis la interparolado, kaj S
Bernard sciis lerte kaj ĝentile respondi al ĉiuj
demandoj. Tamen, iom post iom, la temoj iĝis p
malfaciloj ĉar oni traktis religiaĵojn; kaj vigla
malica sinjorineto, senaĝa pro siaj blondkolorigi
haroj, kun incitemaj okuloj nigraj ekparolis pri
konfeso.

La konfeso, tiu religia praktiko katolika per kiu
konfesas siajn plej sekretajn, intimajn kulpaĵojn por
la dian pardonon.

La juna kaj ambicia abato barakttis por ne transpaŝi siajn pastrajn devojn kaj samtempe ne malplaĉi al siaj (eble potencaj) kontraŭparolantinoj, kiuj unuvoĉe opiniis ke tia kutimo estas tro peniga.

« Peniga ankaŭ por la konfesprenanto, li rediris, « precipe kiam li estas juna kaj ankoraŭ ne sperta; tiel « mi memoras ke mia unua konfesantino kulpigis sin « pri adulto, nu ...... »

Lian rakonton interrompis la eniriĝo de nova vizitantino, kiu, kiam al ŝi oni prezentis la pastron, surprize ekkriis : « Sinjoro Bernard, ĉu estas vi aŭ ĉu « mi trompiĝas ? »

— « Do vi konas nian novan vikarion, Sinjorino » diris la mastrino.

— « Certe, reparolis la Sinjorino, mia ekskonfesprenanto, « eĉ mi estis lia unua konfesantino !!!.... »

Mirego !.. Konsterno !.. Vidaĵo !..

Ĉiuj oni aŭdis krieton, kvazaŭ ekĝemon, kaj oni vidis la junan pastron terure paliĝantan, defali sur sian seĝegon. Li pretekstis subitan malsaneton, aerplenan bezonon, kaj malgraŭ ĉiuj helpoj al li proponitaj, li petis forpermeson.

Post tri tagoj oni eksciis ke Abato Bernard estis anstataŭita kaj de tiu tempo, iam oni ne plu vidis lin

en la subprefekta urbo.

Oni pensas ĉiam ke, pro sia kapableco, li estis anka[ŭ]
pli alte rangigita.

# Diab kaj la bela Djâzia

## Araba legendo

Tiu ĉi legendo laŭ la rakontantoj okazadis la[...]
unuan centjaron ĉe la hodiaŭa Alĝera lando.

Ĝi estas unu inter multaj aliaj pri la gento [...]
Uled-Hilal'oj, kiu, bone montras la tiamajn aro[...]
morojn; amon, kavaliran senartifikecon, flanke d[...]
trompemaj ruzoj, epopeajn bataladojn, rakontojn [...]
ĉasado, scenojn de la migranta kaj paŝtista viva[...]
ĉion oni trovas en tiuj kantadoj ofte poeziaj kaj v[...]
originalaj.

Ilin oni rakontas liberaere, dum la longaj [...]
noktkunvenoj, ĉirkaŭe de l' bivakaj fajroj; ili es[...]
tiel multaj kaj diversaj ke ĉiam oni havas novaj[...]

Cetere la aŭdantoj neniam laciĝas; sidante s[...]
siaj kalkanoj, envolvitaj en siaj burnusoj, ili aŭsku[...]
silente kaj religie la voĉon de la rakontanto supr[...]
-irantan meze de la nokta kvieteco. Tempon post tem[...]
unu el ili antaŭigas sian nudan brakon por reviviĝ[...]

la fajron, kaj tiam la flamo sendas pli helan rebril-
sur ĉiujn tiujn vizaĝojn atentajn kaj ŝajne bronzumitajn

La vidaĵo de tiuj senmovaj homoj, en la mirinda kadro de Sahara'aj noktoj, multe impresas kaj oni kredas vivadi en la heroaj tempoj kiam Diab'o la Hilalano trakuris, rajde, la ebenaĵon, persekutante la rabiston, kiu forportis sur sia ĉevalo la belan Djazia'on

Tiu Djazio ludas gravan rolon en la Hilala Epopeo same kiel ŝia amanto Diab'o supernomita. Ŝi donis sian nomon al romana tombo kuŝanta proksime de la vilaĝo Khenchela en la Konstantina provinco

Jen estas la legendo.

Dum la tempo kiam la Hilala Gento estis starigiinta sian tendaron ĉe Sahara, vivadis filino de nobela deveno, kies beleco fama estis glorata de ĉiuj kavaliroj. Oni ŝin nomis Djazio bent Serkan

La gento fieriĝis pri ŝi kaj la plej belaj kantoj, nokte kantataj ĉirkaŭ la fajroj estis verkitaj pri ŝi

Tiun tagon, Djazio estis kunveninta en sian hejmon, kvardek nobelajn filinojn por ia festo. Nu, tiun saman tagon junulo de l'sama partio nomita Diab ben Ganem, orfo kiu posedis nur kvardek ŝafinojn kaj unu ŝafon, estis paŝtanta sian brutaron

en la ĉirkaŭaĵo de la tendo de la junulino. Ĉar li
rimarkis de malproksime virinan kunvenaron, li forla
sian brutaron kaj alpaŝis por ilin vidi de pli proksime

Dum li rigardis ilin, li ekvidis apud la Djâzia'a
tendo, du vazojn en kiuj ŝi kreskigis artiŝokojn kiuj
multe lin tentis. Li ekprenis sian tranĉilon, ilin
detranĉis kaj ilin manĝis.

Tion ekvidante Djâzia ekkriis al li: « Za. Hi
tiel forpelante lin, malestime, per la krio uzata po
la kameloj, kaj al li dezirante unu el la malsan
de tiuj bestoj.

Diab'o respondis verse:

Tiu malsano estas por tiu, kiu ne zorgas pri sia ga
La verdaĵo, emblemo de l'printempo estas rezervota
Incitata per tiuj vortoj, Djâzia tiuj diris ~~al~~ la gasto siaj
amikinoj: « Ni ekiru ĉiuj elpreni po unu ŝafo el l'
junulo » Tion ili rapide faris kaj alportis al la
tendo la kvardek ŝafinojn de Diab'o.

Tiu ĉi, tion vidante, ekprenis la ŝafon kaj ĝin
alportis mem; kaj la filinoj mortiginte la ŝafin
Diab'o siaflanke mortigis la ŝafon dirante, ĉiam

Ŝafaĵo estas la viando de amantoj
Ĝi estas grasa kaj gustoplena.
La ŝafidoj kaj la kazeiĝita lakto estas la nutraĵo de la Ĉrat

Potenca anaro sin ĵetis sur mian brutaron;
La militantinoj estis tiel nombraj, kiel miaj ŝafinoj;
Sole ili lasis la ŝafon, alvokantan siajn ŝafinojn,
Kiel patrino por plendaj blekoj;
Tiu ŝafo estis mia parto el prenaĵo,
Ĉar la virbesto ĉiam apartenas al la virhomo.
Ĉiuj ŝafinoj estis mortigitaj,
Mi mortigis ankaŭ la ŝafon.
Tia estas la ~~[illegible]~~ irado de la mondo,
Jen oni estas riĉa, jen malriĉa:
Mia havo estis forportita de junaj nobelaj filinoj;
Honoro por mi tio estas kaj bona antaŭsigno.

Tiuj paroloj kaj la granda ŝajno por kiu ili estis diritaj naskis pripenson en Djazia, kiu konkludis: «Tiu Diab'o havas altajn sentojn, li estos fama homo.»

Tial ŝi admonis siajn amikinojn, ĉiuj filinoj de granda tendo, por ke ĉiu petu el siaj gepatroj unu kamelinon por doni al Diab'o ben Ghanem, kompense de la ŝafinoj, kiujn tiel kavalire, li estis oferdoninta al ili, kvankam nur el tio konsistis lia havo.

Tiele estis farita; ĉiu junulino donacis unu kamelinon kaj Djazia donacis unu kamelon.

Diabo daŭrigis paŝti siajn kamelajn bestojn kiel iam li paŝtis sian ŝafaron.

Post unu jaro proksimume, fojon kiam li estis ilm
kondukintaj sur paŝtejon, li ekvidis alvenante al li,
ĉevalidinojn mane kondukatajn de ia homo. Unu el
blankkolora ekruliĝis teren kaj ekreleviĝis tiel rapide
ĉi tute ne tiris sian kolbridon; tiagrade ke ĝia ko
-kanto ne ekvidis tiun agadon. Tuj Diab'o
komprenis, ke tia besto devenis de tutpura raso kaj
estos rapidegiranta.

Li demandis al la homo kiu estas Hebreo, kion
tiu ĉi volas, interŝanĝe, por sia blanka ĉevalidino. La
homo respondis: « donu vian tutan brutaron. Diab
rifuzis kaj post longa disputado la Hebreo akceptis
kamelinojn kaj donis la ĉevalidinon.

De tiu tempo Diab'o ben Ghanem ĉiam kondu
siajn bestojn kun sia blanka ĉevalidino, kiun li nut
anstataŭ per hordeo, per la lakto de siaj kamelin

Tri aŭ kvar jaroj tiel pasis kaj la blanka ĉevalidino
iĝis bela ĉevalino. Samtempe la brutaro de Diab'
estis plimultiĝinta kaj ~~li, iom riĉiĝinta~~ ĉar li estis iom
riĉiĝinta, li lasas sian kamelaron gardatan de paŝtisto.

Li pasigis sian tempon ĉasadante. Poste li partopren
la raziaĵojn (rabadoj) faratajn de lia partianaro kon
la najbaraj popoloj, kaj baldaŭ lia famo pri kuraĝo kaj
braveco disvastiĝis malproksimen tra la tuta lando.

Samepoke Hebreo riĉa komercisto kiu trairis la regionon pro sia komercado ekscis pri la mirinda belec[o] de la bela Djâzio. Nu, ĉar li ne povis peti ŝin por edziĝo, li ekintencis ŝin forrabi. Por atingi tiun celon li alvenis la Djâzian duaron (tendaron) rajdante sur ĉevalo tiel vivega kaj rapidiranta ke li kredis ke simila ne ekzist[is].

Alveninte apud la tendoj li demandis kiel kutime « Kiu dezira aĉeti juvelojn, orajn kaj arĝentajn ĉirkaŭ-brakojn? » Djâzio aŭdis lin kaj alsendis unu el siaj servistinoj por elekti du orajn ĉirkaŭbrakojn. La virino alpaŝis la vendiston, kiu, demandinte el kiu ŝi venis, al ŝi remetis du juvelojn por ŝia mastrino.

Vidante la juvelojn, Djâzio tre ŝatis ilin, sed baldaŭ ilin resendis pro ilia tro granda amplekso. La vendisto donis du aliajn, sambelegajn kiel la unuaj, sed ili estis tro malgrandaj. Tiam la Hebreo diris al la servistino, kiam ilin ŝi realport[is]: « Petu vian mastrinon ke ŝi venu mem por ke ŝi provu aliajn. Vidante sian brakon, tuj mi elektos tio[n] kio taŭgas. »

Djâzio prisciigita de sia servistino, eliris el sia tend[o] kaj alvenis la fremdulon, kiu estis restinta sur sia ĉevalo. « Kial vi ne malrajdas? » ŝi diris. Li respondis: « Ĉar mi ne havas multe da tempo, tre baldaŭ mi forir[os]

kaj mia komercaĵo ne estas embarasa. Mi estas vizitonta aliajn duarojn; rapide provu la juvelojn kaj tuj mi foriros. Djazio alproksimiĝis nemalfide, sed dum ŝi antaŭigis siajn manradikojn por ilin mezurigi, la Hebreo subite ekkaptis la junulinon, ŝin altiras al si, kaj perforte sidiginte ŝin sur sian selon, galopegante li ekforkuras.

Kelkaj tieaj duaranoj ĉeestis tiun rapidegan kaj maltimegan forrabon, sed, pro ĝia rapideco, ili ne havis tempon por kontraŭstari al ĝi; tial tuj ili eksaltis sur siajn ĉevalojn kaj ekpersekutis la rabiston, alvokante kunhelpon de la najbaraj duaranoj.

Tiun tagon, Diab'o ben Ghanem estis foririnta matene por ĉasadi kune kun du el siaj amikoj, Zid'o kaj Buzian. La ĉasantoj estis mortigintaj gazelon kaj estis haltintaj por kuiri pecon da ĝi. Apude staris iliaj ĉevaloj maĉadante siajn enbuŝaĵojn ankoraŭ blankajn per ŝaŭmo. Subite la blanka Diaba ĉevalino levas sian kapon, starigas siajn orelojn kaj longe blekas. Diab'o ekkriis:

La blanka ĉevalino blekas, malfeliĉaĵo okazas
Aŭ nia gento estas atakata, aŭ Djazio forrabata estas.

La tri homoj eksaltis sur siajn ĉevalojn kaj revenis sian duaron. Tuj de sia alveno, ili eksciis pri la forrabo de la junulino kaj senhalte reforiris al la rabisto.

Sekvante la postsignojn baldaŭ ili atingis la Ble...

-Hilal, kiuj persekutas la vendiston, iom disiĝintaj pro la ~~rapido~~ iro pli aŭ malpli rapida de siaj ĉevaloj. Diabo kies ĉevalino estis tiel nelacigebla kiel rapidirega, baldaŭ estis preteririnta, kaj kiam ekkrepuskiĝis li fine ekvidis la Hebreon. Tuj kiam li povis aŭdigi sian voĉon, li kriis al Dĵazio kiu alturnis sian kapon por lin vidi:

Ho vi, kies okuloj estas similaj je tiuj de juna gazelo,
Kies vangoj brilas kiel suno,
Kies brakoj estas tiel blankaj, kiel blankegaj hindaj glavoj,
O mia amatino en ĉiuj miaj noktaj revadoj
Por kiu mia koloro brulas pro amo.
Ho Dĵazio, ne havu ian timon
Per miaj manoj mi mortigos tiun Judon, filon de l'peko
Mi returnen iros mian tendaron.

De tiu momento, Diabo estus povinta atingi la Hebreon sed li pensis ke tiel agante, la aliaj persekutanto alvenus preskaŭ samtempe kiel li kaj li ne povus kunesti sola kun Dĵazio. Do li daŭrigis la persekuton, detenante sian ĉevalinon, ĉiam kuremantan malgraŭ la longa farita kurado.

Je la noktiĝo, li komprenis ke li estas sufiĉe malproksime de siaj kunanoj por ke ili ne povu atingi lin kaj li ektimis ke pro la venanta nokto la rabisto fariĝu nevidebla. Tial per superega peno li ekpuŝis antaŭen sian bonan ĉevalinon, atingis la Hebreon malhelpatan

de lia rabaĵo kaj lin traboris per sia lanco....

Diab'o kaj Djazio, kiuj sekrete amis sin reciproke de sa
unua intervido fine estis kunigataj, solaj en la profunda nokt
liberaj por konfesi sian amon, unu al la alia, malproksime d
ĝenaj aŭ malbonaj rigardoj.

Djazio tute emociata de ilia kuniĝo en tiaj kondiĉoj, ~~li~~
kies en koro pligrandiĝegas ankoraŭ por tiu, kiu ĵus liberigis
el ŝia malŝatinda rabisto, estis tuj malsupreniranta el sia
ĉevalo, por ĵeti sin inter la brakoj de sia liberiganto kaj
amanto. Sed Diab'o, kvankam li estis tre deziranta ankaŭ
ŝin premi sur sia koro, ne forgesis la singardemon.

Li petis sian amatinon ke ŝi restu sur sia selo, kaj ~~li kond~~
~~la ĉevalojn~~ antaŭataŭ al reveni sur la sama vojo, li kon
la ĉevalojn sur alian vojon por eviti la duaron ne
rekontonte la rajdantojn.

Tiel, ambaŭ ili vojiris kune, ĉirkaŭ unu horon. Diab
malŝparis al sia kunulino la plej karesajn vortojn kaj ŝi
la koro plena je amo, povis nur respondi per ekĝemoj k
nefinataj vortoj. Ian momenton, ĉar iliaj ĉevaloj malpr
-iĝis, Diab'o kliniĝis, ekkaptis la belulinon ĉe ŝia talio, ŝi
altiris al li kaj metis longadaŭre siajn lipojn sur ŝiajn lip
Tremetante ĝis funde de si mem, kaj duonsvenginta, Dj
post momento liberiĝis el lia premado. « Ho, Diab'o ŝi
murmuris per voĉo tiel malforta, kiel la Sahara venteto

dum somera vespero, Diabo dolĉa objekto de miaj vivaj revadoj, ci kiun mi amas de tiel longatempe nesciate de mia patrino; cia amo estas pli dolĉa ol cia brako estas forta; mi apartenas al ci, mi estas cia aĵo, cia havo. Pli longe ci ne suferigu min. Malsupreniru kaj alvenu sur mian koron.

La juna homo respondis: « Ho Djazio, cia lipo estas pli agrabla al la mia ol la ~~fre~~ malvarma fonto de la oazo post longega irado. Mi amas cin de la tago kiam mi cin vidis la unuan fojon, kaj mia tuta estaĵo antremas pro la penso ke tuj ci estos al mi. Mi volas cin, mi dezirας cin el tuta mi mem, sed pli bone estas ne malbonaĵi. Morgaŭ la rajdistoj de nia gento sekvos niajn postsignojn kaj se ni estus malsuprenirintaj, malbone ili parolus pri ci kaj suspektus cian virton.

La amo ne devas forgesigi la singardecon, kaj ni povas iĝi feliĉaj, nesciate de iu. »

~~Tiel~~ Li diris, kaj sin apoganto sur sian lancon, eksaltis facilmove sur la ĉevalon de la junulino. Tiu ĉi, kiu estis divenintа lian intencon lasis lokon malantaŭ si, poste sin turnante al li, ĉirkaŭis lin per siaj belaj brakoj, lin kisis sur lian buŝon kaj sin ellasis fermante siajn grandajn okulojn de gazelo . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Kiam ili estis liverintaj sin al ĉiuj ebriecoj de reciproka am
Diab'o ben Ghanem rerajdis sur sian ĉevalinon liĝitan al
sia lanco trapuŝita en tero, kaj la du amantoj ekvienojiris

La ĉi supseraj verde enkadriĝitaj linioj estis anstataŭitaj de mi en La Alĝeria Stelo per la ~~jenaj~~ jenaj:

sed vi estas tiel nobla kiel kuraĝa kaj amema, vi komprenos m
La juna homo respondis: « Ho Djâzio, via lipo estas pli agrab
al la mia ol la malvarma fonto de la oazo post longega
irado. Mi amas vin de la tago kiam mi vin vidis la
unuan fojon kaj mia tuta estaĵo amtremas dum tia feliĉa
kaj neatendita momento. Tamen vi vidos ke mi estas inda
je via tuta amo; vi estos prava pensante ke mia respekto
egalvaloras mian amon. Ĉetere ni ne devas malrajdi ĉar
morgaŭ la rajdistoj de mia gento sekvos niajn postsignojn
kaj se ni estus altereniĝintaj, malbone ili parolus pri vi kaj
suspektus vian virton. »

Ili daŭrigis do sian ĉevalan vojiradon la tutan nokton,
farante mil projektojn pri sia estonta feliĉado kaj alvenis
la duaron, nur la morgaŭan tagon, matene.

Vidante ke ili revenas ambaŭ kune, multaj Hilalanoj
opiniis ke la bela filino estis eble doninta sian rekompencon
al sia kuraĝa savinto. Oni sendis ses rajdistojn por ke,
sekvonte la ĉevalajn postsignojn, ili vidu se la du gejunuloj
ne estis malrajdintaj. Post du tagoj la senditoj sciigis ke

la diritaj signoj ĉie estas reguloj, kaj sekve Diabô kaj la bela Djazio, ie ne estis haltintaj.

Multegaj el la Hilalanaro estis kontentiĝintaj de tiu sciigo kaj opiniis ke la juna filino kiel iam estis tiel virta. Aliaj ne povis kredi ke ~~la bela Djazio tiel savita, estus povinta malcedi al la dezirio, kiu, komprenebla allogis~~ homo kuraĝa kaj brava kiel Diabô, kiu ĵus savis tiel belan filinon kaj restadis kune kun ŝi la tutan nokton, ne estus farinta uzon el la feliĉa kaj ununura okazo kiun al li sin prezentis.

Inter tiuj lastaj ~~opiniantoj~~ troviĝis Khalifo Zenato, militisto timinda pro sia kuraĝego, la plej potenca el la Hilala subgento (la Zenatanoj) kies estro li estas. De longedaŭra tempo, sekrete li amis Djazion kaj pro ĵaluzeco, laŭte li opiniis ke la filino estis pekinta.

Iom post iom, la du kontraŭanaroj malpacienciĝis; la Diabanoj defendantoj de Djazio, kaj la Zenatanoj opiniantoj kiel sia estro, unue insultis sin reciproke, poste okazis veraj bataloj.

Dum du tagoj, rajdantojn oni vidis sur la ebenaĵo kaj ĉiufoje multenombraj mortintoj ne reeniris en la tendaroj.

Ĉagrenata de tiaj mortigadoj, kiuj pereigis la plej bonegajn el rajdistoj, Kalifo Zenato proponis al Diabo ben Ghanem elektita kiel estro de liaj partianoj ke ili finu la malpacon

per batalo nur inter si ambaŭ.

Diabo konsentis kaj la morgaŭan tagon ili dubatalis meze de granda rondo formita de la du kontraŭanaroj inter kiuj la bela Djazio estis kvazaŭ prezidantino de tiu duelo okazante pri ŝi.

La du batalantoj estis tiel bonaj kondukantoj de siaj ĉevaloj kaj tiel lertaj pri la skermado per glavo kaj ŝildo, ke ili bataladis la tutan tagon nevunditaj kaj nefaligite. Tiel ili daŭrigis ses tagojn, kiel la unuan fojon.

La okan tagon matene, por kuraĝigi sian amaton, Djazio al li sendis sian ĉirkaŭkolon. Diabo ĝin prenis, ĝin altigis ĝis sia buŝo, kisis ĝin, longe sorbis ĝian bonodoron kiu estas tiu de lia amatino; poste, antaŭ reekbatali metis ĝin ĉirkaŭ la kolo de sia ĉevalino.

La duelo fine estis rekomencata sed tuj de la unuaj batoj la Diaba glavo glitis sur la ŝildon de l'kontraŭbatalanto kaj atingis lian ĉevalon. La bato estis tiel forta ke la besto falis teren, mortigita.

Khalifo Zenato malrajdigite, la batalo ĉesis. Diabo demandis kiam ili rekomencos, l'alia respondis ke li sciigos al li pri tio.

De tiu momento Zenato serĉis bonan ĉevalon, sed ĉar li ne sukcesis ĝin eltrovi, li decidis ke li sendos sian propran filinon al Diabo ben Ghanem por demandi ke tiu ĉi sendos al li sian ĉevalinon; li bone sciis ke Diabo gentilega kaj grandanima ne

ne povos malakcepti ian virinan peton

Djazio eksciis tiun intencon per maldiskreta servisto; tial, vespere ŝi aliris la Diaban tendon antaŭ kiu estis ligita la bona ĉevalino apud alia, ankaŭ blankkolora sed malpli bona; ŝi internigis kudrilojn en la postajn krurojn de la unua; poste, por ilin ŝveligi, ŝi kovris ilin je gudro, kiu, samtempe estis kaŝonta la kudrilojn.

La morgaŭan tagon la filino de Zenato alvenis Diabo'n.

Plej bone kiel eble li akceptis ŝin kaj, post la unuaj dezirojn pri bonveno, petis ke ŝi sidiĝu kaj akceptu manĝeton. Ŝi respondis: « La plej bona kaj la plej agrabla komplezo, kiun al mi vi povus proponi, estus promesi tion kion mi tuj demandos, Diabo rediris: « Feliĉa mi estos se vi havas deziron, kiun mi povos plenumi.»

Jus eperis Djazio, kiu alvenis kune kun kelkaj el siaj amikinoj por saluti la filinon de Zenato. Tiu ĉi tuj al ŝi iris renkonte, ŝin kisis, poste ŝin apartigante montris la du blankajn kvarpiedulinojn antaŭ la tendo, demandante sur kiu el ili Diab'o rajdis por batali. Djazio montris la malpli bonan, dirante ke l'alia estas nebona, kaj cetere, senĉese ĝi havas siajn krurojn ŝvelitajn.

La fremdulino rapide reeniris la tendon kaj tuj demandis al Diab'o ke li vendu por ŝia patro, la plej bonan el ambaŭ ĉevalaj bestoj. « Timon al vi mi povas rifuzi, respondis Diabo, elektu tiun kiun vi volas, mi donacas ĝin al vi.» La junulino,

1 2. 22/

nesanĉeliĝe elektis tiun, kies kruroj estas sanaj: kaj kiu, laŭ
de Diab'o estis tuj kondukata al sia nova posedanto.

Tuj kiam li vidis ĝin, Zenato ekkriis al sia filino: « Mia
tiu besto neniel estas tiu de Diabo; li trompis vin kaj ne e
inda je la famo pri grandanimo kaj nobleco, kiun al li on

« Ho, patro mia, respondis la juna filino, Diab'o estas
plej nobla el la homoj; se tien ĉi li ne alkondukigas la
ĉevalinon de li rajditan kiam li batalis kontraŭ vi, kulpigu
min. Du ĉevalinoj troviĝis antaŭ la tendo; unu havis ba
krurojn, l'alia ilin havis ŝvelitajn: Li petis ke mi elektu k
kredante ke mi bone agis, mi elektis la unuan.»

Tiam la patro: « Kiel eble plej bone vi povis, mia fili
vi faris; okazos kio povos » Kaj surmetinte selon, li rajd
sur la ĉevalinon por provi ĝian iradon.

Kvankam ĝi ne valoris la alian Diab'an beston, ĝi n
estis malŝatinda, tial, ĉar Zenato komprenis ke li ne eltrov
pli bonan ĉevalinon, li sendis, la morgaŭan tagon al sia malam
alvokon pri batalo.

Dum tiu tempo, Djazio tuj de la foriro de l'alia junulin
estis eliginta la kudrilojn el la kruroj de la bona amata best
estis lavinta ĝiajn vundetojn per malvarma akvo, poste sur ili
estis farinta apklikaĵon de henne. Post kelkaj horoj la ĉevalin
estis tute resaniĝinta kaj Diab'o akceptis la novan batalon
Kiel antaŭe, li renkontis sian kontraŭulon meze de cirko

formita de la vidantoj de la du partioj. La signalo estis donata kaj, tuj kiam okazis la unua bato, Zenato falis teren atingita en la flankon. Diab'o sur lin eksaltis kaj ambaŭ ili ruliĝis unu sur la alian.

Ĉar neniu el ili releviĝis, la ĉeestantoj demandis al si kiun forivos venkanton el tiu mortiga duelo.

Ĉiu en sia koro faris mallaŭte, fervorajn dezirojn por sia estro, sed iu ne kuraĝis aliri al batalantoj.

Post mallonga tempo kiu ŝajnis centjaron, fine Djazio ekkriis: « La morto falis sur ilin. » Tiam leviĝante meze de siaj kunulinoj kaj sin turnante al Diabo, ĉiam senmova, ŝi reekkriis: « Ho Diabo, leviĝu kaj alvenu! »

Aŭdante la voĉon de sia amikino, li leviĝis kaj alvenis al siaj aplaŭdantaj anoj, dirante:

Ĉiam la unua en la bataloj
Mia lanco estas kvazaŭ venenita
Mia glavo estas akra kaj metalpura,
Miaj vundoj estas mortigaj.
Mi mortigis la ĉevalon de Zenato
Ian tagon, dum senartifika batalo
Dank'al tio mia kontraŭulo estis savita
Sed en tago markita de l' fatalo
Estis skribite ke li estas mortonta
Tial mia pinta lanco traboris lin

1 2 24

Kaj li falis kiel ruino
Ho malfeliĉa Kalifo Zenato
Viestas foririnta kaj viaj anoj ankoraŭ tie estas.

La renko de Diabo estis rigardata de la tuta Hilalan
Dia juĝo; ĝi malaperigis la kalumniojn de l'Zenatanoj; k
tiu tempo proklamis la virton de la bela Djâzio. Jen kia
Diabo ben Ghanem savis la famon de sia amatino per sia sing
kaj sia kuraĝo. Ŝi rekompencis lin, daŭrigante [redacted] lin ami
malŝpari al li ŝiajn amajn favorojn.
En la Algêria Stelo mi anstataŭis la ĉi superan lastan frazon per la jena:
Li estis rekompencita per edziĝo kun ŝi, fine akceptita de ŝiaj gep

# Nescieco

~~~

Nobelo revenas sian hejmon post trimonata foresta
kaj elveturante ĉe la stacidomo li petas sciigojn el sia
rajtigito alvenante renkonte

– Nu, Batisto kio nova?
– Nero, la hundo mortis venenigita.
– Kiel, venenigita?
– Jes ĝi manĝis vianderon el la ĉevaloj bruligitaj.
– Kiel, la ĉevaloj bruligitaj?
– Jes, la tago kiam la ĉevalejo bruliĝis
~~~

— La ĉevalejo bruliĝis! Sed kiel?
— Pro fajreroj alportitaj de la vento el la kastelo.
— Fajreroj el la kastelo! Sed ĉu la kastelo ankaŭ estis bruligita!
— Jes, kandelego ekbruligis kurtenon, dum la enterigo de la Sinjorino Grafino, tiam....
— Kiel, mia patrino mortis ?!!
— Jes, eksciante la foriron de la Sinjorino Grafino, via edzino
— Kiel, mia edzino foriĝis!

Tiam, la servisto iom miriĝita.

— Sed via Moŝto, do, nenion sciis.

# La Papo mortis
## El Alph. Daudet

Mi vivis dum mia infaneco en granda Franca urbo dividita je du partoj de tre obstrukcata, tre movema rivero, sur kiu, frujune, mi akiris emon por la vojaĝoj kaj pasion por la ~~vivo sur la akvo~~ vivo sur la akvo. Estas precipe ~~[illegible]~~ loko de surbordo, apud ia ponteto St. Vincent, kiun neniam mi memoras eĉ hodiaŭ, ~~[illegible]~~ sen emocio. Mi revidas la surskribon najlitan ĉe la pinto de stango: Kornet: Ŝipoj por lui" kaj la ŝtuparetor kies subaĵo

malaperis en la akvo tute glitigan kaj nigrigitan d
akvumaĵo; la aron da ŝipetoj freŝe pentritaj je he
koloroj, ordigitaj malsupre de la ŝtupareto, kviete ba
iĝantaj bordo kontraŭ bordo, kvazaŭ malpezigitaj o
beletaj nomoj blanke desegnitaj sur lia posto: La
Muŝbirdo, la Hirundo.

Poste, inter la longaj remiloj ankaŭ tutblanke
pentritaj kiuj sekiĝis kontraŭ la deklivo, la nomitan
patron Kornet kun lia pentrujo, liaj grandaj pe
lia vizaĝo tanita, fendetita, sulkigita de mil sulke
tiel la rivero kiam blovas malvarmeta vespera vent

Ho, tiu patro Kornet! Ĝi estis la Satano de m
infaneco, mia dolora pasio, mia peko, mia riproĉo d
konscienco. Kiom ~~[illegible]~~ da krimoj liaj ŝipetoj incitis
min por fari! Mi forlasis la lernejon, mi vendis
miajn librojn. Kion mi ne estus vendinta por surakvoretu
posttagmezon.

Ĉiuj miaj kajeroj funde de l'ŝipo, mia jako
demetita, la ĉapelo malantaŭ mia kapo, kaj tra la harg
la bona ventumilbato de la venteto el akvo, firme mi
tiris miajn remilojn, sulkigante la brovojn por tute
ŝajni maljunan marlupon.

Dum la tuta tempo kiam mi estis en urbo, mi
restis meze de la rivero, samspace de la du bordoj

kie la maljuna marlupo povus esti rekonata.

Kia triumfo partopreni al tiu granda movado de barkoj, flosaĵoj, vaporaj muŝ-ŝipoj kiuj ĉirflanke moviĝis kaj ne tuŝiĝis unu la aliajn, nur malkuniĝitaj de mallarĝa ŝaumobanderolo.

Tie estis pezaj boatoj kiuj turniĝis por [illegible] la fluon kaj tio delokigis multajn aliajn. Subite vaporŝipaj radoj batis la akvon apud mi; aŭ dika ombro alvenis min, tio estis la antaŭaĵo de boato ŝarĝita je pomoj. «Atentu do muŝido» ekkriis al mi raŭka voĉo; kaj mi ŝvitis, mi baraktis, implikita en la iro-deiro de tiu rivera vivo kiun la strata vivo trasuperis senĉese, per ĉiuj tiuj pontoj aŭ pontetoj, kiuj aperigis omnibusojn en la spegulan akvon sub miaj remiloj. Kaj la fluo tiel forta ĉe la pinto de la pontarkaĵoj, kaj la akvoturniĝoj, la fama truo de la "Morto-kiu-trompas"

Pensu ke tio ne estis malgranda afero por gvidi min meze de ĉio tio per dekdujaraj brakoj kaj neniu por teni la direktilon.

Kelkajn fojojn, feliĉe mi renkontis la ĉenon. Rapide mi alkroĉiĝis post tiuj longaj ŝiparoj kiujn ĝi postrenis, kaj, la remiloj senmovaj, sternitaj kiel flugiloj alte flugante, mi lasis min veturi je tiu silenta rapideco kiu ŝajnis tranĉi la riveron per longaj ŝaumorubandoj kaj malaperigis ĉirflanke

la subordajn domojn. Antaŭ mi, malproksime, tre mal
proksime mi aŭdis la unutonajn batojn de la ~~ŝipsam~~
ŝipŝraŭbego; hundo kiu bojas sur unu el la ŝipoj kiu
forflugas el malalta kamentubo, iom da fumo, kaj ĉio
~~kundiĝis~~ al mi donis la iluzion de granda vojaĝo de la
vera mara ŝipvivado.

Bedaŭrinde tiuj renkontoj malofte estis. Plej ofte
estis necese ke mi remu ~~dum la~~ kaj remu dum la horoj
de plena suno. Ho tiuj tagmezoj kun la suno affalanta
rekte sur la riveron; ŝajnas al mi ankoraŭ ke ili min
bruligas. Ĉio flamis, ĉio rebrilis. En tiu atmosfero
blindiganta kaj sona kiu flosas super la ondoj kaj vibras
je ĉiuj iliaj movoj, la mallongaj subakvigoj de miaj
remiloj, la ŝnuraĵoj de la ŝiptiristoj eltiritaj el akvo tute
disfluantaj aperigis kiel fulmo, helajn polvarĝentajn
lumojn. Kaj mi remis fermante la okulojn. Iafoje
pro miaj energiaj penadoj, pro la antaŭensalto de la
akvo sub mia barko, mi imagis ke rapidege antaŭen
mi estis iranta; sed levante la kapon, ĉiam mi vidis la
saman arbon, la saman muron kontraŭ mi sur la bordo

Fine post multaj fortuzoj, tute ŝvita kaj ruĝa pro
varmeco mi sukcesis foriri el la urbo

La bruego de la malvarmaj banejoj, lavŝipejoj, enŝipiĝejoj
malpliiĝis. La pontoj malofteiĝis sur la bordoj plilarĝigitaj

kelkajn posturbajn ĝardenojn, fabrikejajn kamentubegojn, kiujn oni vidis de tempo al tempo. Sur la horizonto verdaj insuloj ŝajnis tremi. Tiam konsumita de laceco, mi rifuĝis apud la bordo, meze de la kankreskaĵoj tute zumaj, kaj tie, duonsvenigita de la suno, la laceco, tiu multepeza varmeco kiu suprenviris el akvo sterumita de larĝaj flavaj floroj, la maljuna marlupo eksangadis el la nazo kaj tio longe daŭris. Neniam miaj vojaĝoj havis alian finiĝon. Sed kion vi volas, mi trovis tion ĉarmega.

Jo terura estis la realveno, la reeniro. Kvankam mi revenis per rapidegaj remilbatoj mi alvenis ĉiam tro malfrue, post la eliro el lernejoj. La impreso de la tago krepuskiĝanta, la unuaj flamingoj en la nebulo, la militaj trumpetaj sonoj por reenirigi la soldatojn en iliajn loĝejojn, ĉio pligrandigis miajn timojn, miajn bedaŭrojn. Mi envïis la homojn kiuj pasis, trankvile reenirantaj en sian hejmon; kaj mi kuris havante mian kapon kvazaŭ plenan de suno kaj akvo, kun konkaj ronkoj en la oreloj, kaj, jam sur mia vizaĝo, la ruĝiĝo pro mensogo kiun mi tuj diros

Car tio estis necesa por, ĉiufoje, respondi al tiu terura «El kie vi venas» kiu atendis min ĉe la pordo. Tiu demando tuj de mia apero estis tio kio plej timigis min. Mi estis devigata respondi tie, sur la sojlo, senatende

havi ĉiam ian historion pretan, ion por diri kaj tiel mirigan tiel miregigan ke pro surprizo oni forgesu demandi aliaĵojn.

Tio al mi donis tempon por eniri, retrovi spiron, kaj por tiun celon atingi, ĉion mi estus farinta. Mi elpensis malfeliĉojn revolucijn, teruraĵn fariĝojn; tuta urba kvartalo kiu brulas la fervojo ponto elfalinte en la riveron. Sed jen tio kion plej forte mi elpensis:

Tiun ĉi vesperon mi alvenis tre malfrue. Mia patrino kiu min atendis de unu longa horo, staris supre de la ŝtuparo. "El kie vi venas?" ŝi ekkriis

Diru al mi, kiaj diablaĵoj povas naskiĝi en infana kapo. Nenion mi trovis, nenion mi preparis; tro rapide mi estis alveninta. Subite min alvenis ideo freneza. Mi sciis ke la kara virino estas tre pia, katolikino enradikita kiel Romanino, kaj mi respondis al ŝi, spiregante kvazaŭ pro granda emocio: « Ho patrineto.... se vi scius! » — « Kion do?....kio okazas ankoraŭ? » — « La Papo mortis....» — « La Papo mortis!....» rediris la kompatinda patrino, kaj tre pala ŝi apogis sin kontraŭ la muron. Rapide mi alpaŝis en mian ĉambron, iom timigata de mia sukceso kaj la grandegeco de mia mensogo, tamen mi maltimis subteni ĝin.

Mi memoras vesperon funebran kaj kvietan, la patro kun malĝoja seriozeco, la patrino premegita

Malbaûte oni parolis ĉirkaŭ la tablo. Mi mallevis la okulojn, sed mia aventuro estis tiel forgesita pro la ĝenerala ĉagrenego ke iu ne pensis plu pri ĝi.

Ĉiu, vice, citis iun virtagon de tiu kompatinda Pio IXª; kaj iom post iom la interparolado perdiĝis tra la historio de la Paparo. Mia onklino Rozo parolis pri Pio VIIª, kiun ŝi tre memoris esti vidinta, traveranta la suda Francujo en tiama veturilo inter ĝendarmaro. Oni memorigis la faman scenon kun la Franca Imperiestro "Komediante!.... Tragediante!...."

Eble estis la centa fojo kiam oni rakontis tiun terurân scenon; ĉiam per la samaj tonaĵoj, la samaj gestoj, kaj tiu neŝanĝeblaco de familiaj tradicioj kiuj, alprenitaj de la posteularo, tiaj kiajn ĝi audis ilin, restas tie, infanoj kaj lekaj kiel monaĥaj historioj.

Malgraŭ ĉio, iam ĝi ne ŝajnis al mi tiel interesplena.

Mi aŭskultis ĝin kun hipokritaj ĝemoj, demandoj, ŝajno de malvera intereso, kaj konstante mi diris al mi: « Morgaŭ matene, eksciante ke la Papo ne mortis, ili estos tiel kontentaj ke iu ne kuraĝos min riproĉi.»

Tion pensante, malgraŭ mi, miaj okuloj fermiĝis, kaj mi vidis, duondorme, blukolorajn ŝipetojn kun anguloj de la rivero Saono varmegigitaj de la suno,

kaj grandajn piedegojn de akvarancoj ĉien kurantajn kaj sulkigantajn la vitran akvon kiel diamantaj erojn.

# Sangverŝa Ziara (1)

Kelkaj zauja'oj (2) Algeriaj posedas ĉiu, unu konon, kiun de tempo al tempo la Zauja'anoj promen-adigas tra la urboj kaj vilaĝoj por kolekti la ziara'on de siaj samreligianoj. Tiuj leonoj kondukataj nur per ŝnuro ĉirkaŭanta ilian kolon, estas de la Araboj rigardataj kiel duonsanktaj; sed ili nemulte similas siajn samdevenulojn en libereco prave nomitajn: la Reĝoj de l'dezerto

Oni vidas la kompatindajn bestojn persekutatajn de malproksime per la abojoj timemaj de la hundoj, marŝantajn melankolie kaj peze, malantaŭ de iliaj kondukantoj, haltantajn kiam iu donas moneron al tiuj ĉi, kaj ree irantajn kun la sama malgaja ŝajno, tiratajn per la ŝnuro lano, kiu detenas ilin mallibere.

Pro siaj dentoj kaj ungegoj eluzitaj per fajliloj de siaj posedantoj; pro siaj okuloj senviviĝitaj de ĉiama fasto, tiuj malfeliĉaj leonoj ŝajnas tute

(1) Monofero donita de la Mahometanoj al religiuloj ilin vizitantaj aŭ vizitataj de ili
(2) Preĝejo enhavanta ofte la tombon de ia sanktulo. En kelkaj zauja'oj estas ankaŭ lernejo kaj loĝejo por la vojaĝantaj Mahometanoj.

maltimindaj.

Tamen malgraŭ ĉiuj plej zorgaj singardoj, malgraŭ senĉesa observado de la gardistoj, iafoje tiuj sangavidulaj kaŭzas terurajn malfeliĉaĵojn, mortiĝojn nepriskribeblajn.

En la maja monato 1894, tri anoj de la Zauja'o de Sidi Mohamed ben Aouda ~~en la~~ Orana Suldlando, estis trairantaj la vilaĝon Kalaa kaj kolektis la ziaria en maŭra kafejo, elmontrante leonon.

Jam ili estis ricevintaj gravajn oferdonojn kaj la moneretoj eĉ la arĝentaj moneroj amasiĝis en ilian ĝbira'on[1]. La leono estis kvieta, indiferenta sen ia montro de malbona humoro aŭ senpacienco, meze de la ĉeestantoj iom timigitaj pro ĝia apudeco.

Tamen araba fremdulo kiu troviĝis en la kafejo, kaj kiu, li diris, estas ekskondukisto de leonoj, sentime alproksimiĝis al la besto kaj, ĉar kredeble li celis la akiron de famo pri duonsankteco, petis permeson kisi ĝin sur la kapon, efektive, reale kaj ne per tuŝo de fingroj.

Post iom da ŝanceliĝo li ricevis tiun permeson.

Tuj kiam la malfeliĉulo nur tuŝetis per sia barbo la kapon de la leono, tiu ĉi subite elĵetas teruregan blekegon, per unu ungbato ĝi tranĉas lian gorĝon kaj, en siaj makzeloj tiel rapide malfermitaj kiel

(1) Granda araba ledmonujo kunportata per rimeno almetita sur la ŝultro.

refermitaj, dispremas lian kapon per sia dentaro ankoraŭ fortega malgraŭ ĝia eluzado.

La besto furioza nur ellasas sian kaptaĵon pro la doloro al ĝi kaŭzita per la bastonegbatoj donataj de ĝiaj gardistoj sur ĝian buŝegon. En ĝia furiozo ekcitata de la odoro de l'varma sango kiu makulas ĝiajn lipojn kaj pro la malvirulo kiun el ĝi oni ĵus forprenis, ĝi turnas sin al la vidantoj kiuj, mutaj pro timego, ĉeestis la teruran okazintaĵon.

Sed sen ia krio, senkonscie instigataj de la timo de morto, ĉiuj ekforkuras hejmen, per opa rapidegeco de brunaj kruroj nudaj, kaj forflugo de burnusoj aeren sternitaj, kvazaŭ flugiloj de grandegaj birdoj.

Solaj la gardistoj tie restas. La leono blekegadanta iras kaj devias ĉirkaŭ ili, sed ĝi ne maltimas ilin ataki. Tiam sur la malmultan meblaron de l'kaŭaĝi (1) ĝi kvietigas fine sian furiozecon. Ligna benko estas rompata per unu piedbato kaj la loko kien frapis la piedego estas forigita kvazaŭ per pecforigilo; la tasoj, la graciaj kaftasetoj, ĵetataj teren, klare sonoras disrompiĝante je multegaj eretoj.

Fine ĝi haltas kaj malrapide ĝi revenas kuŝiĝi ĉe la piedoj de siaj gardistoj, kiu, kiel kutime ĝi

(1) Kafvendisto

reiĝas, almenaŭ ŝajne, indiferenta, kviete kaj malĝoje.

Malgraŭ tiu sango elverŝita, tiu terura mortiĝo, la loko de la zauja'o de Sidi Mohamed ben Auda, ĉiam restas senlime respektegata de la enlanduloj.

En la duaroj (1) kiel en la urboj kaj vilaĝoj; sub la tendoj kiel en la domoj kaj gurbi (2) oj oni rakontas, kaj tiu ĉi legendo estas, de nun, neniigebla; ke la homo buĉita en la kafejo de Kalaa, estis kondamnita je morto de la protektanto de la Zauja'o, Sidi Mohamed ben Auda, pune de malvera ĵuro kiun li estis farinta super la tombo de l'sanktulo.

---

Ĉu la Karolina rondiranto post tiu rakonto mi aldonis la jenajon:
« Miaj karaj geamikoj ne kulpigu min pro la uzo de arabaj
« vortoj. Tiuj vortoj estas el tiuj kiujn, eĉ parolante france, oni
« uzas flue tie ĉi; tial en Esperanto same mi agas.
« Cetere ĉiam mi klarigas ilin per resendaj notetoj, ĉe la
« fino de ĉiu paĝo.

# Tutplena

## Ŝercaĵo de Alph. Allais

Tiæ kian vi vidas min, miaj karaj amikoj, mi ne estis ĉiam milionulo – eĉ nun. Miaj ĉevalejoj ne estis plenaj je tiuj sangpuraj kurĉevaloj kiuj estas

(1) Tendaroj – (2) Dometoj konstruitaj je simpla bakita tero kaj surkovritaj je branĉaĵoj

la angla ĉevaledukado - eĉ mi havis neniam ĉevalejon.

Miaj returilejoj estis senigitaj je la plej malgranda returileto - eĉ mi havis neniam returilejon.

Kelkajn fojojn, vi kredos min se vi volos, miaj financaj provizoj tute malebligis ke mi returu per la plej vulgara fiakro.

Tial, kiam miaj aferoj aŭ miaj bezonoj devigis min transloki mian homan korpon, nur mi havis la rimedon de la omnibusoj; sed sole sur la imperialo.

En unu tago (mi estis tiam tamburisto en cirko ĉe la urbo Versailles - Versaj - — ho mia juneco! — kaj mi elreturis en la stacidomon St Lazare, ironta al Pantheono kvartalo, kie mi havis bonan amikineton ne beletan, sed tiel bonvoleman!

La omnibusoj alvenis en stato de pleneco vere malkonvena, la imperialoj precipe.

Kaj estis varme! varme!! L'asfalto de la bulvardoj similis kirliĝantan glicirizan paston, kien la kalkanoj de la pasantoj internigis sensone.

Plu mi ne memoras kial, obstine, mi ne serĉis lokon internen de la omnibusoj. Ĉu la supermezura varmeco, ĉu la manko da mono? Mi ne scias.

La omnibusoj alvenadis kaj preteriradis ĉiam kun la surskribaĵo: Entplena.

Mi estis tuj ekmalesperonta, kiam mi diris al m
Estas necesege ke tio finiĝu, mi estas preta uzi ia
ajn rimedon se nur ĝi estas sukcesonta, kaj fakte
tiel mi agis, eble nemulte honeste, sed tiel ruze.

Tiom da tempo estas pasinta nun ke mi povas
rakonti al vi tiun petolaĵon.

Nova omnibuso aperis ĉe la horizonto kaj mi
aldonas ke sola ĝi estis tiel plena kiel ĉiuj antaŭaj
kunigitaj.

Ĉe la ekstremaĵo de benko sur la imperialo, side
dika homo sangplena, ŝajne kolerema.

Ju ne malsuprenirus kaj la veturilo preterirus, ma
-rapide pro ia obstrukcaĵo sur la strato.

Tial mi turnis min al la sangplena vojaĝanto
per paroloj el kiuj mi estis forpelinta tutan ĝentilecon.

Unue mi riproĉis ke li ricevas monon de malĝim
drinkema negrulino. Mi aldonis ke li estis kondam
-nita de la juĝistaroj pro malbonmoraj faroj kaj
fabrikado de malveraj bankbiletoj.

Komprenebla la sangplenulo, unue, ne kredis
ke tiuj nemeritataj riproĉoj mi eldiris al li. Li
rigardis demande siajn najbarojn; la najbaroj
rigardis lin; kaj tiam nenia dubo, li komprenis ke
la riproĉoj estas por li.

Li levis la brakon, svingis bastonon kaj ekkriis: « Satana fripono. »

Mi insistis.

Feliĉe por vi, Sinjorinoj miaj legantinoj; mi estas tro bone edukita por ripeti tie ĉi la ĉiuspecajn insultojn kiujn mi malŝparis al tiu sangplena homo.

La tuta vojaĝantaro de la imperialo estis tuta ridanta sed mia dika homo ne havis saman inklinon.

La koloro de lia vizaĝo estis grade supreniranta de la brikkoloro al la plej ruĝa skarlato kaj li daŭrigis krii: "Satana fripono se mi ekkaptus vin" sed li ne malsupreniris.

« Kie ĝi estas do, mi diris al mi, tiu superega insulto kiu malgluos lin el sia benko? »

Mi ekvidis je tiu momento ke li portas ĉe sia butontruo la ordenon de la Milita Medalo. Jen mia afero

Indignanta, kun sajno kiel eble plej kolera, mi kulpigis lin, sendi al Sro Von Bulow, ĉiutagan korespondadon, plenan je maldiskretaĵoj pri nia milita organizado.

Mi ne estis erarinta.

La skarlato malaperis el la vizaĝo de la maljuna bravulo kiu iĝis flavpala.

li malsupreniris.
Sed per lerta kaj rapida iro, mi translokiĝis, forlasante la dekstran flankon por min ĵeti sur la maldekstran, pasante antaŭ la ĉevaloj; kaj dum la homo sangplena serĉis sian nekonatan blasfemanton, konforte mi sidiĝis ĉe sian lokon.
La sangplena homo ne renkontis min, sed ĉar apud li, idiotulo lastmode vestita estis ridanta p[illegible] lia aventuro, li donis al li homeran bastonadon.
Kaj mi tute ne kompatis la idiotulon lastm[illegible] vestitan, ĉar neniam oni devas moki la person[illegible] embarasataj[n].

# Mektub

Krom senfoliiĝi jasmenon kaj pisti florfolie[illegible] de rozoj inter siaj apatiaj fingroj, Jamina pluon faras.
Tamen ŝi estis mabuĉa kaj ĝis nun mi vid[illegible] iradantan per sia ritma irado, helpadantan sian maljunan patrinon por ŝiaj hejmaj laboroj, nur vestitan per veslo de katuno kaj alia vestaĵo arabe[illegible]

"futa", kvazaŭ ĉemizo ĉiam malligita

Tiuj vestaĵoj apenaŭ sufiĉis por kaŝi la koloron flaman kaj sukcenan de ŝia karno, kaj ŝiaj virinaj formoj aperis firmaj, klasikaj kaj modelaj. L'aŭreolo de ŝiaj haroj nature blondaj sed kolorigitaj, dismetitaj de la blovo, la dubeblua ĉirkaŭo de ŝiaj grandaj avidaj okuloj; precipe la lumeto kiu spruĉis el ili, igis ŝin strangaĵi kaj enigman kreitaĵon.

Apud ŝi l'atmosfero estis parfumata de jasmeno aŭ geranio kaj alvenis nin kvazaŭ plena je amo kaj voluptaĵoj.

Ĝis nun la vizaĝo de Jamina havis tiun harmonion de la frunto kaj la okuloj kiu pruvas internan radion. Komprenebble ŝia animo kaj ŝiaj ecoj estis ankoraŭ embriaj kaj senmovaj, car Allah (1) kreis ŝian rason por la servuteco kaj la sklaveco, ĉiam kurbigitan al la tero por labori, neniam starigitan al la ĉielo por pensi. Sed fine la radiigo de l'rigardo tiu "fiat lux" de la inteligenteco estis tie, brilanta precipe pro la ĝojo ke ŝi estas bela, ke ŝi estas juna

×
× ×

Nune la granda alloganta potenco kiu elvenis el ŝi, plu ne ekzistas; ŝi ŝajnas defaligita diaĵo; ŝia

(1) Araba nomo de Dio

rigardo estas vualita de ia ombro, ŝiaj longaj brovoj ĉiam mallevitaj nune, plu ne havas tiun vivecon kiu karesis la animon.

Jamina senmova sur siaj molaj kusenoj ore broditaj, restas tie nepenetrebla kaj mistera kiel la sablo de sia dezerto.

De tempo al tempo skuita de laceco kiu havas ion sovaĝan, siajn graciegajn brakojn konvulsie ŝi altigas super sian kapon dum el sia gorĝo eliras sonoj strangaj kiel la bojo de l'ŝakalo en la soleco.

Anstataŭ sia rido kaj sia gajeco Jamina portas, lutitajn ĉe sia lipo, gluitajn ĉe sia frunto, ĉe la tempioj, sur la vangoj, la mentono orajn brilaĵetojn kvaronlun-formajn.

Etaj bonodorujoj pendiĝas ĉe sia kolo miksligitaj kun nekompreneblaj pendaĵetoj. Ŝiaj haroj en ordo estas kunligitaj per rubandoj vivkoloraj semitaj je dikaj perlamotaĵoj.

Ŝia vesto plu ne estas el katuno sed el silko argente brodita, ŝia ĉemizo el maldika, nepalpebla gazo, kaj ŝiaj pantofloj tro grandaj por ŝiaj etaj piedoj, elmontras apude siajn brilajn oraĵojn.

Ĉio tio ĉar la araba virgulino baldaŭ edziĝos kun fiera kaj riĉa estro; tial ŝi ne laboras plu; ŝi

36 / 112

okupas sin nur parfumante sian korpon, ŝmirante ĝin je plej bonaj odoraĵoj. Ŝi preparas sin laŭ la mahometana kutimo por esti inda je sia edzo kiam ŝi transiros lian pordon.

La tutan tagon, ŝiaj kunulinoj junaj kaj maljunaj ŝin vizitadas. La maljunaj, pli aŭ malpli kurb-iĝitaj malŝparas la konsilojn de sia malnova sperto. Dum la junaj eltiras el kesteto la pezajn juvelojn ĉizitajn, ilin palpadas, ilin rigardadas per duonenviema okulo. Kaj la tutan tagon, murmuradoj, zumadoj, pepadoj miksitaj kun gorĝaj ekkrioj, pleniĝadas la malgrandan ĉambron ĉirkaŭitan de kolonareto, poste forflugas eksteren per ĝojaj bruaĵoj.

La preterirante haltas. sciama kaj aŭskultas momente tiun alfluon kaj defluon de virinaj voĉoj.

Meze de tiu gajeco, kial do Jamina estas malgaja?

Ja ŝi ne konas sian fianĉon, sed ĉu ŝi ne scias ke ŝia patrino post multaj interparoladoj vendis ŝin altpreze al malŝparema sed malbela maljunulo al kiu oni laŭdis ŝian junecon, ŝiajn ĉarmojn, ŝian belecon. Ĉu jam li ne elspezis la duonon de la monprezo kondiĉita sur la kontrakto, promesante ke li elpagos la lastan parton tuj kiam li ne plu povos dubi ke ŝi estas tiel bela kiel oni certigis

al li.

Sed ne! Jamina estas nek malgaja nek gaja, ŝi estas nur la ilo indiferenta kaj pasiva de l'sorto, la ludilo de l'fatalo. Ŝia sorto plenumiĝas.

Tiun ĉi tagon mi estis alveninta ŝian hejmon kune kun kelkaj vizitantinoj por ŝin gratuli.

Ho ve! tiuj pezaj ĉirkaŭkruroj ĉe ŝiaj maleoloj ŝajnis al mi katenaĵoj de sklavoj; ŝiaj kapjuveloj sur la frunto, la signo de la servuteco; ŝiaj orajêtoj sur la vangoj la neforigebla makulo de la groteskeco tra la centjaroj. Ĉio tio tedis min kiel la esprimo de nevenkebla barbareco.

Tiuj juvelaĵoj hodiaŭ ornamitaj, mi diris al mi, morgaŭ kondukotaj per vipbatoj neniam estos pretaj por la liberiĝo, neniam alvenos la horo por la vivino de Oriento!.... kaj sincere, mi laŭte ekkompatis ŝin.

Unue ŝi ridetis, poste refariĝis serioza, kaj levante ŝian dekstran manon ŝarĝitan je pezaj metalaĵoj ŝi respondis grave:

"Mektub Rebbi" Dio tion volas.

# La Duonokulvitro

Monologo

Tradukita kaj tajlgiĝita por Esperanto, de mi

(Ŝi eniras penante starigi sian duonokulvitron antaŭ sia okulo)

Mi estas certa ke vi demandas al vi, ne sentinte kial vane, mi penadas subteni ekvilibre tiun duonokulvitron. Post kelkaj minutoj via timo plu daŭros.

Plu ĝi ne povos daŭri, ĉar tuj mi sciigos al vi pri mia situacio, kiu estas unu el la plej penigaj. Estas pripensu, ĝis kia grado nedube ĝi estas peniga, por ke mi venu kiel vi vidas, rakonti miajn historietojn antaŭ tiel nombra aŭdantaro.

Do antaŭ dudek-ok tagoj, ellitiĝante ian matenon-pam! mi ekvidis ke mi estas enamiĝinta. Senutile mi skuiĝis, malfermis mian fenestron, subakvigadis mian tutan kapon en lavvazon, tio ne malaperis. Mi estis jam enamiĝinta; enamiĝinta de mia najbarino, adorinda vidvineto... ĉiam nigre vestita. Gajega tio ne estis sed tiel bone ornamas ŝin (Paŭzo) Ĉu vi ne rimarkis kiel la nigro bone ornamas la vidvinojn.

Eble estas pro tio, ke tiom da ili restas nekonsoleblaj; kiu scias?

Do mi gantis min .... nigre, delikata atento, kaj diskrete mi alfrapis ŝian pordon. Nia interparolado estis nekredeblega. ~~Ne-kred-e-bleg-a~~ Ne-kred-ebl-eg-a. Tuj mi sciigas al vi ĝian konkludon.

— « Sinjoro via peto flatas min, sed mia unua edzo
« tro enestas, memore, en mia penso, por ke mi povu
« akcepti duan.»

— « Tion mi tre komprenas Sinjorino, sed escepto
« farita por mi donus al mi la feliĉon. Tio okazis al
« mi tiun ĉi matenon: ellitiĝante, pan! senutile mi
« skuiĝis, malfermis mian fenestron......»

— « Se vi cedus Sinjoro, estus je tiel stranga kondiĉo..» (Al la kunsidantaro). Jen la nekredeblegaĵo; vi tuj vidos...., ne-kred-ebl-eg-aĵ-o!

— « Mia unua edzo, daŭrigas mia vidvino, estis
« nomita Temistoklo.»

— « Nur mi konas samnomitan faman antikvan
« militestron .....»

— « Ĝi ne estis li. Temistoklo min amis kaj mi
« amis lin»

— « Mi preterpasu Sinjorino; mi preterpasu.»

— « Li estis bona, servema, neniam reenirante

post la deka vespere. Ĉiumatene mi alportis lian ĉokoladon sur lian liton kaj li diris dankon! par dol voĉo. Li sciis ankaŭ tre bone Esperanton kaj ĉiam « ni interparoladis per tiu belsona lingvo. Li havis « akademioficiran ordenon kaj ankaŭ cikatron ĉe la « ŝultro.... »

— « Jes Sinjorino, li estis bravulo, sed..... »

— « Kaj lia duonokulvitro Sinjoro! lia duonokulvitro admirinde almetita antaŭ lia okulo. Ĉiam mi « demandis al mi, kiamaniere li povis atingi tian mir- « egindan ekvilibron. Sinjoro mi resumas: Penadu po « simili Temistoklon, Prenu lian nomon, prenu lian « vizaĝon, prenu lian tutan fizionomion; kaj tiu dua « edzeco ŝajnu por mi esti la sekvo de l'unua. »

— « La dua eldono....... Ĉu vere estas la « duonokulvitro? »

— « Necesega, Sinjoro, tie estas tuta Temistoklo. »

(Paŭzo)

Ĉu vi ne opinias ke tio estas nekredeblega?

Mi kuris al mia kombisto kaj ordonis ke li faru al mi tiun ĉi kapon. Tia kian vi vidas min, mi havas la kapon de mortinta Temistoklo. Li ne estis tre malbela. Mi prenos lian nomon kvankam beleta ĝi ne estas; dum iaj karesaj momentoj esti

vokata «Totoklo!» Aŭ ne, ĉar ni interparoladis Esperante: Vi vidas ke mi bone ellernis tiun lingvon; (dek lecionoj ne plu) tiam ŝi alvokos min Teĉjo aŭ Temiĉjo; ha tio estas gracia Temiĉjo (plezure ridetante) Temiĉjo!

La ĉokolado ĉiumatene sur mia lito, tio pli ol alio ne estas malagrabla. Temistoklo diris al ŝi: Dankon! per dolĉa voĉo, mi diros al ŝi, dankon! per dolĉa voĉo: (akravoĉe) Dankon! Aŭ (plezurŝajne) Ha dankon! Mi preferas: Ha dankon! tial ke dirante (akravoĉe) dankon! ŝajnas ke mi ~~ludas~~ kartludas (Baccara'on, (Akravoĉe) Banko! Dankon! Banko.

Ĉar Temistoklo havis akademioficiran ordenon, mi aĉetis da violkolora rubando sufiĉe por almeti sur ĉiujn miajn vestojn, jakon, veŝton, ĉemizon eĉ flanelan veŝton, sed nur en mia hejmo ĉar ekstere tio ne estas permesita. Fine la cikatro ĉe la ŝultro ne ŝajnas al mi necesega ĉar, kiam mia vidvino rimarkos ĝian neestadon, estos tro malfrue.... (Ridetante malice) Nedube estos tro malfrue.

(Kalkulante per siaj fingroj) Esperanto, la cikatro la ĉokolado, la ordeno, ĉio estas tre bone, sed restas la duonokulvitro, la malbenita duonokulvitro; neeble subteni ĝin. Post oktaga nesukcesa provo, mi sen

al mia adorinda Eŭzebio, mi forgesis sciiĝi al vi p
oni nomas ŝin Eŭzebio, kelkaju versoju. Plezuron
mi havos diranta ilin al vi; mi scias ilin parkere.

Al virino kiu ordonis ke mi portu duonokulvitron, kvanka
tiu optikilo tute estas ŝanĝonta mian vidmanieron.

Mi estas via sklavo, markizino,
Sed viaj rajtoju ne trovu mi petas.
Per du okuloj mi vidas vin, divino.
Postuli triau, tio kruela estas.

(Longe li rigardadas, fiere, la aŭdantaron) Oni faras tion
kion oni povas.

Ŝi respondis ke ŝi ne povas seniĝi je duonokulvitro
Ha se mia okulo ankaŭ ne povus seniĝi je tiu vidilo
... tio estus feliĉo; ... sed se mi ne havas la bravuja
ostarkaĵon faritan kiel tiu de la estinta Temistoklo,
kion fari! Ĉu havas sian ostarkaĵon.

De hodiaŭ matene mi povas iom subteni ĝin, ne
ŝanĝante mian fizionomion. (Li metas ĝin kaj malbela
grimacas) Kiam mi silentas ĝi ne moviĝas, sed tuj kiam
mi malfermas la buŝon, ĝi defalas. Vidu! Li metas ĝin
kaj raŭke ekkrias) Ha!!! (La duonokulvitro falas) Vi
vidas: Se mi ĝenus ĝin, tiam neeble ĝin demeti; tio
naskus aliaju malhelpaĵojn... ĝi povus ĝeni min....
(riderante) Estas iaj momentoj kiam ĝi povus ĝeni min

Des pli ke ĝi tute min blindigas,.... nenion mi vidas,.. se iam mi sukcesos subteni ĝin, necese estos, ke mi tiuj akiros hundeton.

(Li realmetas senatente la duonokulvitron) Ha mi ne konas la elpensinton de tiu ĉi vitrero, sed se mi konus ĝin mi aldirus al li: «Sinjoro....» (Eksentante ke la okulvitro ne falas.) Sed ĝi ne falas! ĝi ne falas! ĝi ne falas! Mi ekkuras al mia promesitulino. (Li foriras ĉien palpante kiel blindulo)

# La Ĉarmo de Alĝero.

## El la Alĝeria Skelo

Dum la civilizacio tute aliigis parton de la urbo Alĝero estas alia parto, sur la krutaj deklivoj de la Kasbo kiu, pro sia malriĉeco kaj sia malfacila atingebleco, ĝis nun ne estis difektata de la dirita civilizacio.

Tiu tuta flanko de la malnova urbo, kun sia maŭra loĝantaro, sia interna vivado, estas nun apenaŭ ŝanĝita, kaj povas doni ideon pri la vidaĵo iam elmontrita de la urbo de la marrabistoj

Amasigata en la plej malvasta spaco, ĉe la supro

fermita de la remparoj, sube de la Kasbah(1) en kiu la zuavoj(2) anstataŭis la janiĉarojn(3), la malnova araba urbo estas hodiaŭ ankoraŭ tute aparta urbo, kiun neniam oni vizitas sen plezurego, malgraŭ ĝia malbonodora malpureco kaj la suspektinda loĝantaro kiu enloĝiĝas pli kaj pli ĝiajn neatingeblajn angulojn.

Tuj kiam oni estas eniruinta en ĝiajn multegajn stratetojn mallarĝajn, sub ĝiajn arkaĵojn misterajn kun senfinaj ŝtuparoj, kie oni iradas inter domoj zorgeme fermitaj, blindigantaj pro iliaj blankaj, rozaj, palbluaj koloroj kalke pentritaj, vere ŝajnas ke oni estas subite transportita en iun novan landon nekonatan kaj tute fremdan kaj malproksiman; nenia aŭ preskaŭ nenia Eŭropano.

Kapturbanigitaj Maŭroj, envolvitaj en dube-blankaj burnusoj, malrapide trapasas kun malŝata majesteco kontraŭ la Eŭropano; duope aŭ triope, la virinoj iradas kun, sur la vizaĝo, blanka vualo, nur elmontrante grandajn okulojn nigrajn, markitajn je bluaj tatuaĵoj aŭ pentritaj brovoj; vestitaj per blankaj hajkoj(4) kaj tro larĝaj pantalonoj kiu malhelpas ilian iradon; la infanoj ludas sur la pavimita strato, duonnudaj, kriantaj, kantante, iafoje sin kaŝante, alifoje alvenante kun alvokaj ridetoj,

(1) Fortikaĵo kaj palaco de la Dey — (2) Francaj militistoj turke vestitaj.
(3) Iamaj turkaj militistoj (4) Ŝtofaĵo kiu surkovras ĉiujn aliajn vestaĵojn ĉe la Orientaninoj.

senhonte peti monereton almoze.

Je via alpaŝo, la malaltaj duonfermitaj pordoj, la malmultaj kaj mallarĝaj fenestroj ferbaritaj, senbrue fermiĝas; la kristano ankoraŭ estas la malamiko; la loĝantoj ĉiam estas la filoj de la iamaj Maŭroj tiel longe misteraj por la aliaj homaranoj, kaj malbone submetiĝitaj, eĉ nun je la najbareco de siaj venkintoj.

Oni sentas, ke tiuj kvartaloj volonte mallumaj, nur aerumitaj de iliaj terasoj, malgastamaj kaj malamikaj por la pasanto, ne ŝanĝiĝis de kelkaj centjaroj; la hodiaŭaj stratoj estas tiaj, kiaj ili estis dum la epoko de Cervantes kaj de la dey (1) Hassan; kaj, ne nur ilia surpriza vidaĵo, la ĉarmo de ilia luma kaj malluma kontrasto, la pentrinda iro kaj deiro de ilia loĝantaro igas ilin ravegaj por la vizitantoj, sed ili estas por la restariĝo de la estinto, nekompareblaj dokumentoj pri tiu vivado, tiu movado tiel aparta, ke, sola la imago povas ĝin rekrei en alia parto de la urbo.

(1) Iamaj guberniestro turka

# Dek-kvinaŭgusta Ordenito

de Alph. Daudet, tradukita de mi

Ian vesperon, en Alĝerujo, je la fino de ĉasa tago, mi estis veturanta la urbon Orleansville, kiam sur la

Ŝelifan ebenaĵon ekokazis granda pluvego. Oni vidis nenian vilaĝon aŭ karavanejon; nur multajn etajn palmujojn aŭ pistakujojn kaj grandegajn plugitajn terspacojn ĝis la limo de horizonto. Plie, la rivero Ŝelifo pliigita de la pluva falego ekronkis terure kaj mi estus devigita pasigi tie la nokton meze de marĉejo.

Ŝeliĉ la tradukisto de la Araba Oficejo [1] de Miliana, kiu akompanis min, ĝustatempe rememoriĝis ke proksime de ni, kaŝita en valeto, kuŝas tendaro, kies aga'o [2] estas konita de li, kaj ni decidis ke ni iros peti al tiu gentestro ke li gastigu nin tiun nokton.

Tiuj arabaj vilaĝetoj de la ebenregiono estas tiel internigitaj en la barbariaj figujoj kaj aliaj similaj kreskaĵoj, iliaj branĉdometoj estas tiel malalte konstruitaj, ke ni troviĝis meze de l'duaro [3] ne ekvidinte ĝin. Ĉu estis la malfrua horo, ĉu la pluvo, tiu granda silento?.... Sed la loko ŝajnis al mi tre malĝoja kaj kvazaŭ premegita de ia malfeliĉego, kiu tie estus interrompinta la vivadon.

Sur la kampoj de la tuta ĉirkaŭaĵo la rikolto estis nezorgita. La grenoj, la hordeoj ĉie aliloke kolektitaj tie kuŝis putriĝantaj kie ili kreskis. Herpiloj, plugiloj

---

(1) Milita alĝera Administracio — (2) Araba estro.
(3) Aro de dometoj.

rustiĝintaj kuŝis forlasitaj sub la pluvo. La tuta gento havis tiun saman ŝajnon de malgojeco aŭ forlaseco. La hundoj bojis apenaŭ pro nia alveno. De tempo al tempo, funde de unu el tiuj dometoj nomataj gurbi"oj, oni aŭdis infanajn kriojn kaj oni vidis trairantan en la densejo, la senharan kapon de ia bubo aŭ la haik'on[1] de ia maljunulo.

Tie ĉi aŭ tie, azenetoj frosttremantaj inter la arbetaĵoj. Sed nenia ĉevalo, nenia viro... kvazaŭ okazus ankoraŭ la grandaj bataladoj kaj ĉiuj rajdistoj foririntaj de longaj monatoj.

La domo de l'aga'o, longa farmdomo kun senfenestraj muroj ne ŝajnis pli viva ol la aliaj. Ni trovis la ĉevalejojn malfermitajn kaj malplenajn, sen iu ĉevalisto por akcepti niajn bestojn. « Ni iru al la maŭra kafejo » diris mia kunulo.

La loko nomita maŭra kafejo estas kvazaŭ la salono por vizitantoj de la arabaj kastelanoj; domo en la domo rezervita por la trapasantaj gastoj, kiu ebligas al la Mahometanoj tre gastamaj, akcepti la diritajn vojaĝantojn, gardante samtempe la familian intimecon ordonitan de la leĝo.

La maŭra kafejo de l'aga'o Si Sliman estis malfermita kaj senbrua kiel liaj ĉevalejoj. La altaj muroj kalke blankigitaj, la armiloj ornamaj, la plumoj de

strutoj, la larĝa kaj malalta kanapo ĉirkaŭ la ĉambro, ĉio disfluis sub la pluva akvo enpelita de la ventego tra la pordon.

Tamen ni troviĝis en la kafejo; unue la kafeisto maljuna kabilo vestita je ĉifonaĵoj, sidanta sur siaj kalkanoj, lia kapo inter liaj genuoj apud fajrejo renversita; poste la filo de l'agaʼo, bela infano febra kaj pala, kiu ripozis sur la kanapo, envolvita en nigra burnuso, kun du grandaj leporhundoj ĉe siaj piedoj.

Kiam ni eniris nenia moviĝis; apenaŭ unu el la hundoj sublevis sian kapon, kaj la infano provis direkti al ni sian belan okulon nigran, febrigitan kaj konsumitan.

— Kaj Si Sliman ? demandis la tradukisto.

La maljunulo faris super sia kapo ian nedifin-itan geston montrantan la horizonton, malproksimen tre malproksimen...

Ni komprenis ke Si Sliman estis foririnta por granda vojaĝo; sed ĉar la pluvo malebligis nian vojiron, la tradukisto sin turnante al la agaido, diris per araba lingvo ke ni estas amikoj kun lia patro kaj ni petas ke li gastu nin ĝis la morgaŭa tago. Tuje la infano leviĝis malgraŭ

la maltano kiu lin bruligas, donis ordonojn al la kafeisto, kaj per ĝentila maniero, montrante al mi la kanapojn kvazaŭ li dirus: „Vi estas miaj gastoj." li salutis laŭ la araba maniero, klinante la kapon, sendante kison per siaj fingroj, kaj volviĝante en siaj burnusoj, li foriris kun mastra kaj agaa graveco.

Tiam la kafeisto ekbruligis la fajrejon, metis sur ĝin du boliletojn kaj, dum li pretigas por mi la kafon, mi povis ricevi de li kelkajn klarigojn pri la vojaĝo de lia mastro kaj la stranga nezorgeco en kiu estas la gento.

La Kabilo rapide parolis kun gestoj de maljuna virino, per bela gorĝa lingvaĵo jen akcelata, jen interrompata de grandaj silentoj kiuj ebligis aŭdi la pluvon kiu falas sur la mozaikon de la internaj kortoj, la bolilojn kiuj kantas kaj la bojojn de la ŝakaloj dissemitaj je miloj sur la ebenaĵo.

Jen kio okazis al la malfeliĉa Si Sliman.

Antaŭ kvar monatoj, la dek-kvinan de Aŭgusto, (imperiestra festtago) li estis ricevinta tiun faman ordenon de la Honora Legio, kiun li atendis de tiel longatempe.

Li estis la sola agaŭ en la provinco ne ĝin posedanta. Ĉiuj aliaj estis kavaliroj, oficiroj eĉ du aŭ tri portis

ĉirkaŭ sia haik'o la Grandan Rubandon de Komandoro kaj tute naive en ĝin pwiigis sian vazon kiel multfoje mi vidis la baŝaga'on[1] Bualem tiel farantan.

Ĝis nun malebligis ke Si Sliman estu ordenita, ia disputo; kiun li estis havinta kun franca oficiro, estro de la Araba Oficejo post kunludo per ludkartoj, kaj la kamaradeco inter militistoj estis tiel potenca en Alĝerujo ke, de dek jaroj, la nomo de l'aga, ĉiam enskribita sur la proponitaj nomaroj, ne sukcesis. Tial vi povas imagi kian ĝojegon sentis la estiminda Si Sliman kiam, la dek-kvinan de Aŭgusto matene, milita rajdisto el Orléansville alportis la etan juvelujon kun la atesto de legiano, kaj Baja, la plej amata el liaj kvar edzinoj, alkroĉis la krucon de Francujo sur lian burnuson faritan je kamelaj haregoj.

Pro tio okazis ĉe liaj gentanoj diffa'oj[2] kaj fantazia'oj[3] senfinaj. La tutan nokton la tamburetoj la kanaj flutoj sonadis. Okazis dancadoj, fajregoj pro ĝojeco; mi ne scias kiom da ŝafoj estis mortigataj kaj por ke nenio manku ĉe la festo, fama verkisto de Djendel verkis por la honoro de Si Sliman, belegan kantadon komenciĝantan jene: « Vento, jungu ciajn rapidirajn ĉevalojn por disporti la

(1) Subestro, subaga'o — (2) Publikaj festenadoj (3) Kuradoj de arabaj rajdistoj kiuj samtempe krias kaj pafas per pafiloj.

bonan sciigon.»

La morgaŭan tagon, tuj de la tagiĝo, Si Sliman ordonis al sia tuta gumo (1) ke ĝi rajdu kaj kune kun ĝi, li aliris Alĝeron por danki la guberniestron. Ĉe la urbaj pordoj la rajdistaro haltis laŭ kutimo. L'agao iris sola al la gubernia palacon, sin prezentis al Duko de Malakoff kaj certigis lin pri sia sindono al Francujo, per kelkaj frazoj sonaj de tiu orienta stilo, kiu oni famigis metafora, tial ke de tri mil jaroj, ĉiuj junaj homoj estas komparitaj je palmarboj, ĉiuj virinoj je gazeloj.

Plenuminte tiujn devojn, li supreniris la altan urbon por sin montri; pasante li faris siajn religiaĵojn en la mahometana preĝejo, disdonis monon al malriĉuloj, eniris ĉe barbirojn kaj brodistojn, aĉetis por siaj edzinoj akvaĵojn bonodorajn, silkajn ŝtofojn kun grandaj koloriĝitaj floroj, bluajn korsaĵetojn ore pasamentitajn, ruĝajn botojn de rajdisto por sia agaido, pagante senmarĉande kaj disverŝante sian ĝojon per belaj moneroj. Oni vidis lin en bazaroj sidantan sur tapiŝoj de Smirno, trinkantan kafon ĉe la pordo de maŭraj vendistoj kiuj lin gratulis. Ĉirkaŭ li, la popolamaso sciema multiĝis. Oni diris: « Jen Si Sliman, l'Ambrur (2) jus al li sendis

(1) Rajdistaro — (2) Franca vorto (Empereur) = Imperiestro malbone elparolita de la Araboj.

la krucon.» Kaj la junaj Maŭrinoj, kiuj venis el bano manĝante kukaĵojn, direktis sub siaj blankaj maskoj, longajn admirantajn rigardojn al tiu bela arĝenta kruco tiel fiere portata. Ha! oni havas iafoje bonajn momentojn dum la vivo!

Vespere, Si Sliman estis tuj realizonta sian guma'on kaj jam li metis piedon en la piedingon kiam ŝaŭs'o(1) de la prefektejo spiregante alvenis lin.

«Jen vi Si Sliman, ĉien mi serĉas vin... Rapide revenu, la guberniestro al vi intencas paroli!»

Si-Sliman sekvis lin ne maltrankvile. Tamen, trairantan grandan maŭran korton en la palaco, li renkontis sian estron de la Araba Oficejo kiu faris malbonan rideton. Tiu rido de malamiko timigis lin, tial tremante li eniris la salonon en kiu la Marŝalo Pelissier, duko de Malakoff kaj guberniestro, sidis sur seĝo kiel rajdanto.

«Si Sliman, li diris malafable laŭ sia kutimo, per tiu nazsona voĉo, kiu tremetigis liajn kun-virantojn; Si Sliman mia amiko, mi estas ĉagrenega.... eraro estas..... oni ne volis ordoni vin, sed la kaid'on(2) de la Zug-Zug'oj... estas do necese ke tuj vi redonu tiun krucon.»

La bela vizaĝo bronzumita de l'aga'o ruĝiĝis

(1) Pedelo — (2) Araba estro, sur'aga'o.

kvazaŭ proksimiĝita al forgeja fajro. Terura tremo ekskuis lian grandan korpon. Liaj okuloj ekflamis... sed tio estis nur fulmo. Preskaŭ tuje li malleviĝis ilin, kaj kliniĝis antaŭ la guberniestro.

« Vi estas la ĉefo, Sinjoro » li diris, poste li detiris la krucon de sia brusto kaj ĝin metis sur tablon. Lia mano estis tremanta, ekaperis larmoj ĉe la pinto de liaj longaj okulharoj. La maljuna Marŝalo estis kortuŝata. « Nu, nu, mia bravulo, via vico alvenos la proksiman jaron. » Kaj li prezentis sian manon por bonanima ŝajno.

Kvazaŭ ne vidante ĝin, l'aga'o senrespondе kliniĝis denove kaj foriris. Li sciis tion kion valoras la promesoj de l'Marŝalo kaj vidis sin de nun malhonorigita pro oficeja intrigo.

La scii'gon pri lia malfavoro, jam oni disvastigis tra la tuta urbo. La Hebreoj de la strato Bab-Azun, malafable ridis kiam li trapasis. La arabaj vendistoj male, pro kompato deturnis sin, kaj tiu ĉi kompato doloris lin pli multe ol tiuj ridoj. Rapide li marŝis apud la muroj, kaj intence serĉis la stratetojn plej malhelajn.

La loko de sia kruco forigita bruliĝis lin kvazaŭ malfermita vundo. Kaj senĉese li pensis: Kion tiuj

dios miaj rajdistoj? Kiu dios miaj edzinoj?»

Tiam en si mem li sentis ekpuŝojn pro furiozeco; li vidis sin predikantan pri la sankta milito ĉe la landlimoj de Marok'o ĉiam ruĝaj pro bruladoj, aŭ trakurantan la stratojn de Alĝero kune kun siaj gumanoj, rabadantan la Hebreojn, mortigantan la Kristanojn kaj fine, falantan mem, meze de tiu granda malordiĝo en kiu li estis kaŝonta siaŭ honton. Ĉio al li ŝajnis ebla pli bone ol reiri lian genton.....

Subite meze de tiuj venĝemaj projektoj, penso pri la Imperiestro sprucis en lin kiel lumo.

«L'Ambrur!.....» Ĉe Si Sliman kiel por ĉiuj Araboj, la ideo pri justeco kaj potenco estis enigita en tiu sola vorto: «L'Ambrur!»

Li estis la vera estro de la kredantoj de tiuj degenerigitaj mahometanoj; la alia, tiu de Stambul ŝajnis de malproksime kiaŭzaŭ ia estaĵo de saĝo, la nevidebla papo kiu gardas nur spiritan potencon kaj, en la nuna tempo oni scias kiom tiu povo valoras.

Sed l'Ambrur kun liaj grandaj pafilegoj, liaj zuavoj, lia fera ŝiparo.... Tuj kiam li ekpensis pri li, Si Sliman esperis ke li estas savota. Nedube

la Imperiestro tuj redonos lian krucon; tio postulas oktagan vojaĝon. Kaj tion, tiel forte li kredis, ke li ordonis al sia gumo ke ĝi atendos lin ĉe la Alĝeraj pordoj. La morgaŭan ~~tagon~~ vaporŝipon kunportis lin sur la direkton de Parizo, tute pian kaj kvietan kiel por pilgrimo al Meko.

Kompatinda Si Sliman! Kvar monatoj pasis de la tempo kiam li foriris, kaj la skribaĵoj senditaj al liaj edzinoj ne parolis pri lia realveno. De kvar monatoj la malfeliĉa aga ô perdita en la pariza nebulo, vivadis kurante tra la ministrejoj, ĉie mal--atentigata eĉ mokata, kaptita en la timeginda maŝinaĵo de la franca administracio, resendata de oficejo al oficejo, malpurigánta siajn burnusojn sur la kestoj por ligmaĵo en antaŭĉambroj; atendanta audiencon neniam okazantan. Poste, la vesperon, oni vidis lin kun lia longa vizaĝo malgoja, preskaŭ ridinda pro lia majesteco, atendantan lian ŝlosilon en la oficejo de meblita hotelo, kaj al sia ĉambro li supreniris lacigita de tiom da iradoj kaj klopodadoj; sed ĉiam fiera, kroĉiĝinta al la espero, obstinanta kiel malgajninto kuri por rekapti sian honoron....

Dum tiu tempo liaj rajdistoj tere sidantaj ĉe la pordo Bab-Azun atendis kun la orienta fatalismo; la

ĉevaloj ligitaj al fostoj blekis al la mara flanko. En la gento ĉio estis interrompita. La rikoltoj mortis pro manko da brakoj. La virinoj, la infanoj kalkulis la tagojn, ~~turnante~~ la kapo turnita al Parizo. Kaj ~~kompatinda~~ estis io kompatinda vidi kiom da esperoj, da maltrankviloj, ~~kaj~~ da ruinoj jam ~~estis~~ kaŭzitaj de tiu peceto de ruĝa rubando....

Kiam ĉio tio finiĝos?

« Nur Dio scias tion » diris la kafeisto ekĝemante, kaj tra la pordo duonfermita, sur la ebenaĵon violkoloran kaj malgajan, lia brako nuda montris al mi blankan kvaronluneton, kiu supreniris en la akrumita ĉielo

# La Tabako

## Humoraĵo de Alphonse Karr

Bonega franca verkisto publikigis iam tagon la jenan humoraĵon

Imagu al vi antaŭ tri jarcentoj, ĉirkaŭ la jaro 1559a, kiam Nicot (Niko) ambasadoro de

la Portugalujа reĝo Francesko II^a, estis alportata en Francujon, la unuan specimenon de tabako por ĝin donaci al Katerino de Medicis; imagu vi homon kiu, prezentata al Kardinalo de Loreno, estus al li dirinta.

— Via Moŝto, ĉar eble via financa administracio bezonas monon, mi alvenas por proponi al vi la kreon de imposto kiu senpene kaj ne kaŭzante ian plendon, enirigos en viajn monkestojn, en tago venonta ĉirkaŭ unu centon da milionoj. Imposto laŭvola, al iu netrudata sed kiun, bonvole, ĉiu homo partoprenos.

— Ni vidu vian projekton, estus dirinta la Kardinalo:

— Jen ĝi via Moŝto: Estus necese ke la ŝtato gardus por si la rajton vendi ian herbaĵon, kiun iuj enigus pulvigitan en sian nazon, aliaj maĉus ĝiajn foliojn aŭ ilin bruligus por enspiri ĝian fumon.

Se la kardinalo estus aŭskultinta, li estus dirinta:

— Ĉu ĝi estas de parfumo pli agrabla ol la sukceno, la rozo, la jasmeno?

— Ne via Moŝto estus respondinta la homo, male, ĝi malbonodoras sufiĉe.

— Ĝi estas do sensama kuracilo, miregindа

resaniĝilo kiu revivigos la mortantojn.

Tute ne, via Moŝto, la kutimo enspiri tiun pulvon malaperigas la memoron, la flaradon kaj kaŭzas kapturnojn. Maĉite, ĝi iĝas la elspir-aĵon malbonodoran kaj povas kaŭzi terurajn malbonojn en la stomako.

Kiam oni enspiras la fumon jen alia afero. La unuan fojon kiam oni provas ĝian uzadon, ĝi naŭzas, kaŭzas vomojn, intestajn dolorojn, sed post kelka tempo ~~iam~~ post iom oni povas kutimi kaj tiuj simptomoj povos malaperi. Cetere la laboristoj pri ĝia preparado, baldaŭ havos oftajn malsanojn, kolikojn, kapdolorojn, nervajn tremojn. Tute ili malgrasiĝos, fariĝos ftizaj k.t.p. – k.t.p.

Sed, ĝi estas veneno tiu ĉi herbaĵo, estus respondinta la Kardinalo de Loreno, ĉiam supozate ke tiun homon li estus ankoraŭ aŭskult-inta post la unua frazo.

Jes via Moŝto, veneno el la plej danĝeraj

Kaj kiam vi kredas ke estus da malsaĝuloj aŭ frenezuloj kiuj akceptus fumi tiun herbaĵon maĉi ĝin aŭ enigi ĝian pulvon en la nazon.

Alvenos tagon kiam ili estos pli ol tridek

milionoj, via Moŝto.

La kardinalo de Loreno estus doninta ordonon por elpeli tiun homon aŭ enfermi lin en frenezulejon, kvankam tiu Kardinalo estis sufiĉe ema por la riskaj entreprenoj.

Nu! la Kardinalo de Loreno estus estinta malprava.

Hodiaŭ la Francujaj loĝantoj bruligas, maĉas aŭ enigas en siajn nazojn, dudek milionojn da kilogramoj de tabako..... k.t.p. (tiel estis la kvanto en la tempo kiam skribis Alfonso Karr.

# La Ĵuro de Halima

## Araba Rakonto

Ali ben Naser estis kurioza homo. Oni povis nomi lin, la Imaga trompato. Li pensis nur pri malicaĵoj eble faritaj al li de sia edzino, li vidis sin ĉiam trompatan aŭ trompotan, lia vivo fluis meze de senĉesaj timoj.

Se iafoje li renkontis iun kiu lin salutas, ridetante, li pensis ke tiu rideto estis ironio kaj moko pro la malfidelaĵo de lia edzino.

Eĉ la dormo ne alportis kvietecon al lia turmento ĉar en sonĝo, li tuj vidis sin nedube trompatan, li ĉeestis sian propran malfeliĉon, tiam li provis eksalti sur la gekulpulojn por ilin ekkapti, ilin batadi, eble ilin mortigi, sed nevid-ebla forto enkatenis liajn movojn, kaj sennova, senpova, senvoĉa, li estis devigata rigardadi la plenumiĝon de sia neriparebla malfeliĉego.

Tiel li pasigis sian tempon observadante sian edzinon. La nokton, subite li ekvekiĝis, kaj dum longaj horoj, sin kubutapoganta en laciĝaj teniĝoj, sekrete li observadis ŝin, detenanta sian spiron, premanta sian koron kiu batis preskaŭ ĝis rompiĝo.

Tage, kiam li estis forironta, zorge li duoble ŝlosis la pordon, kaj ĉiufoje li ekzamenis ĉu la seruro ne estis difektita. Poste, senkaŭze li reeniris hejmen subite kaj senbrue, kaj aperis antaŭ sia edzino.

Kelkafoje li sciigis al ŝi ke baldaŭ li forveturos por longa vojaĝo, li faris nombrajn preparaĵojn

kvazaŭ por longedaŭra forestado kaj fine li foriris donante multon da antaŭzorgoj kaj saĝaj konsiloj por la tuta daŭro de sia malĉeestado.

Li iris pasigi la tagon en ian maŭran kafejon, poste, je la krepuskiĝo, rapide li reeniris, penante kredigi ke grava afero malhelpis lian ekvojiron.

Ĉiuj tiuj mallertaj ruzoj estis baldaŭ komprenitaj de lia edzino, la juna Halima, kiu estis pro ili, tre ofendita. Tial ŝi ĵuris ke ŝi venĝos sin kaj ŝi elpensis multajn malicajn rimedojn kiujn tuj ŝi ~~[illegible]~~ ekuzis. Tafoje ĉar ŝi sciis ke sia edzo ŝin aŭskultas trans la pordo, ŝi ekparolis mallaŭte kvazaŭ ŝi alparolus iun; tiam Ali sin ĵetis en la ĉambron kaj ...... restis tute embarasata vidante sian edzinon senkulpe kuŝantan sur siaj kusenoj kaj eksplodantan pro ridego.

Alifoje ŝi metis sub la litkovertojn de la lito, pakon de vestaĵoj kaj ĉifonoj aranĝitajn por simili homan korpon. Ali enirante la vesperon tuj sin direktis al la lito kaj palpante en la mallumo tiun insidaĵon li ekblekis pro furiozeco; rapide kaj perfortege eltiris, eltiris la kovrilojn, incitata de frenezа ĝojo pro la kapto de sia malamiko, kaj fine li eltrovis ..... nur senforman pakon de ĉifonaĵoj

Tamen tia malfido forpelis el la koro de Halima ŝian amon, eĉ iom post iom ĝi naskis malamon.

Tiam baldaŭ vastiĝis la scio ke de nun ŝia edzo povas havi kaŭzon por ŝin suspekti, ĉar dudek-kvinjaran belulon nomitan Belkassem iuj vidis ofte trairantan apudan terason, enirantan ĉortum de Halima, poste malsuprenirantan en ŝian hejmon.

Kaj vidu la strangecon de la sorto. Ali kvankam ĉiam suspektema, neniom malkovrinte iĝis pli trankvila. Liaj teruraj timoj iom forflugis, li dormis pli kviete la nokton, kaj la tagon, li observis pli malofte la farojn de sia edzino.

Tial li estis preskaŭ feliĉa. Ne, li ne estis feliĉa tial ke li estis trompita, sed ĉar tion li ne sciis, kaj ĉar la feliĉo konsistas el la nescio pri sia malfeliĉo kaj la kontentiĝo pro tio kion oni havas, ni povas diri ke Ali ben Nasser estis preskaŭ feliĉa.

Sed, iun baldaŭan tagon, lia feliĉeco estis interrompita de malbona maldiskretulo nomita Abdallah.

Dum ili kunludis per ŝakoj, naskiĝis interdisputo kaj Abdallah, ĉion dirinte, finis jene : « Mia kara Ali, anstataŭ tiel disputi, pli bonege vi agus, observante vian edzinon kiu trompas vin kun

bela junulo pli juna ol vi."

Je tiuj vortoj Ali terure paliĝis kaj senresponde, tuj li foriris ŝanceliĝante.

Dum li alkuris al sian domon, li rememoriĝis multon da cirkonstancoj kiuj pruvas la neduban kulpecon de lia virino. Ĉiuj agoj, ĉiuj gestoj de Halima, ŝiaj plej sensignifaj paroloj, revenis en lian person kun tute aparta senco, unuj plifortigantoj la aliajn por certigi la perfidon de la malfidelulino.

Li eniris kiel ŝtelisto en sian domon. Hodiaŭ li tute ne pensis uzi antaŭzorgojn kiel kutime; neniel li pensis trarigardi en la seruretruon aŭ senbrue malfermi la pordojn por silente kaj neatendite alveni ĝis Halima.

Ĉiujn tiujn artifikojn li forgesis nun ĉar li havis la certigon ke li estas trompita.

Li sentis furiozan koleron kaŭzitan de multe da sentoj; unue la bedaŭro ke havo kiun li kredis nur sia, estas havata de aliaj; due la vundo de lia memestimo kiam li estis pensanta ke sia aventuro, kredeble diskonigita, igis lin ridinda; fine la malsukceso de lia observado, obligante ke lia edzino mokas lin, trompas lin kiel naivulo, lin tiel singard-eman, tiel spertan laŭ lia kredo.

Alvenante en la internan korton de sia domo,

li haltis ĉar li ekaŭdas la klaran voĉon de sia edzino kiu kantas verse la gajan kanteton jenan:

Amiko se pri via alveno
Mi estus antaŭsciigita
Mi estus metinta sub viaj piedoj
Kvazaŭ silka tapiŝo
La purpuron de mia koro
Kaj la nigron de miaj okuloj

×
× ×

Amiko se pri via alveno
Mi estus antaŭsciigita
Mi estus metinta kiel lito
Miajn belajn mamojn firmajn
Kaj miajn blankajn femurojn
Je diafana karno

×
× ×

Amiko se pri via alveno
Mi estus antaŭsciigita......

« — Vi ne estus kantinta versojn al via amanto, « ekkriis Ali per furioza voĉo; ha malbona kaj « senhonta virino, fine mi havas la pruvon de « via hontinda konduto.»

Halima surprizita ineze de sia kanto, unue ne povis respondi, poste, ĉar ŝi komprenis ke

neniam pruvon li havas, ŝi levis sian kapon, kaj duonĉagrena, duonmokema, kun adorinda ĝojo lin rigardis kaj ŝi alparolis jene:

« Kion vi havas! Ĉu mia estinta konduto ne garantias
« mian nuntempan kaj estontan konduton? Ĉu iam vi
« povis al mi riproĉi eĉ la plej malgrandan pekaton!

« Ne sed .......»

« Tiam, kial tiu senkaŭza kolero? Diru ĉu iom malbonan mi faris!»

« Ne, sed tiu kanteto .....»

« Tiu kanteto! sed de vi mem mi ellernis ĝin,
« se ĝi estas riproĉinda, kial do al mi vi kantis ĝin?»

Tiuj saĝaj paroloj alfalis sur Ali'on ben Naser kiel malvarmega pluvbano. Certege la rakontaĵoj de Abdallah estas malveraj, ili estas neatentindaj kalumnioj de kolera homo..... Tamen ĉar pro lia suspektemeco, ĉiuj liaj timoj, liaj duboj ne povis tute forflugi, li prenis subitan decidon.

« Aŭskultu Halima, li diris, mi konfidas al vi sed mi volas, por silentigi la malbonan voĉon de mia konscienco, peti de vi iom kio tute trankviligos min.»

« Kio estas?» respondis Halima, timigata.

« Jen; morgaŭ matene ni iros al la tombo de la marabut'o (1) Sidi ben Hassen kaj tie vi ĵuros ke

(1) Sanktulo

nenia viro krom mi, iam vidis la intimajn detalojn de via nudeco.»

«Tutkore mi akceptas» diris la virino, kaj ŝajne indiferenta ŝi ekokupiĝis pri hejmaj laboroj, kaj
tial Ali vidante ŝian trankvilecon ekĝemis pro kontentiĝo kaj eliris el ŝia domo por enspiri freŝan aeron.

Tiam Halima profundiĝis en malgajajn pensojn. Ŝia idiota edzo per ĉiuj tiuj suspektoj metis ŝin en grandan embarason. Sume ŝi estis tre religia kaj por la tuta oro de l'mondo ŝi ne
volus estus volinta fari malveran ĵuron. Ŝi sciis, ke tio estas tre grava, precipe super la tombo de marabuto kiel la respektinda Sidi ben Hassen, kiu tuj mortigas aŭ blindigas la kulpulon. Tamen la morgaŭan tagon, ŝi estos devigata elekti unu el tiuj ĉi du rimedoj: Aŭ ŝi konfesos sian tutan malbonan agadon al sia edzo, kaj tiam kio povas okazi? Aŭ ŝi faros malveran ĵuron.

Subite ŝi ekridetis, ŝi estis trovinta solvon....
Ŝi supreniris al la terason kaj alvokis maljunulinon nomitan Aiŝa, sian sindonan konfidantinon, al ŝi parolis mallaŭte dum

momento kaj poste malsupreniris, la rizaĝoj krietan, kaj la okuloj brilaj pro malico.

La sekvantan tagon frumatene, Ali ben Naser kaj Halima ekvojiris al marabuto Sidi ben Hassen kiu kuŝas sur monteto ĉe la cirkaŭaĵo de Konstantino, sed iom malproksima de la urbo.

Halima kiu tion sciis, post kelkaj centoj da paŝoj, ekplendis kaj du aŭ tri fojoj ellasis de sia piedo sian sandalon.

« Nu, kion vi havas ? » diris Ali

« Nenion ŝi respondis, sed la vojirado estas longa, « mi vidas tien azenon, kiun volonte mi rajdus ĉar « mi estas laca. »

La edzo por kontentigi sian edzinon tuj alvokis azeniston kiu sekvis ilin, donis al li kelkajn mon-erojn kaj sidigis Halima'on sur la azenon, kiu tuj ektrotetis pro bastonbatoj de sia kondukanto.

Ĉar Ali ben Naser ne povis tiel kuri kiel la besto, baldaŭ li restis sola malantaŭe, kaj tiam, l'azenisto kiu estis la juna Belkassem komprenis ke li ne povis esti aŭdata de la edzo kaj rapide aldiris:

« Kara Halima vi vidas ke fidele mi estas plenuminta vian ordonon. »

« Dankon kara Belkassem, el granda danĝero

# La ŝuldo de Cezaro

## Novelo de Georges d'Esparbès

Ian matenon de la 1809a jaro, la franca imperiestro promenis kune kun Berthier kiun jus li estis nominta Princo de Wagram. Ili estis finantaj ~~pa~~ parolado pri Cezaro.

— „Ĉar via Imperia Moŝto kredas ke la fama
„ Roma Estro neniam eraris, bone volu aŭskulti
„ tiun ĉi anekdoton:"

„Oni rakontas ke iama subeficiro, nomita Sextius
„ homdekestro en kohorto de la kvina legio ~~batis~~ havis
„ kaŭzon por plendi ~~pri~~ Cezaro. Tiu homo estis
„ soldato de dek jaroj kaj li estis farinta multajn
„ heroaĵojn senrekompence. La popolo per la voĉo
„ de ia advokato tion sciigis en ~~kunveno~~ de la Senato
„ kiu mallaŭdis Cezaron."

— Kaj kio fariĝis Sextius!"

„— Cezaro lasis lin en la forgeso por montri ke
„ li ne plenumas la ordonojn de l'Senato."

— „Cezaro estis maljusta respondis la Imperiestro
„ pripensema."

— Marŝante ili alvenis apud regimento kiu faris manovron.

Tuj kiam li ekvidis la regestron la kolonelo ordonis tamburadon kaj ordigis vice sian militistaron laŭregule.

Sekvate de la Marŝalo, Napoleono eniris en la vicojn

Senmovece Emocia. Meze de tiu homamaso, la imperiestro marŝis, kvazaŭ, en plena soleco inter uniform-aro sed ne soldataro, ĉu laŭlonge de homaj palisaroj internigitaj teren, nemovigeblaj. Iafoje li haltis apud unu el tiuj kapoj, sen spiro sen rigardo sen penso, kaj observe li rigardadis ĝin.

Poste malrapide, li daŭrigis sian promenon, haltis ankoraŭ unu sekundon, iafoje unu minuton antaŭ alia soldato. Poste muta kiel li, Cezaro preterpasis.

Li ekzamenis precipe la maljunulojn. Atente li serĉis, ŝajne, ĉe tiuj maljunaj vizaĝoj, iun proteston, iun plendon, iun vorton eble detenitan pro la disciplino.

Poste, preskaŭ timeme li aliris la junajn vizaĝojn li observis la senkrucajn brustojn, la sengalonajn manikojn, la rekrutojn kiuj jam ne atingis la gloron, kiuj ne estis povintaj doni sufiĉe da tempo, sufiĉe da sango; la junaj tiel altkreskaj, tiel fieraj kiel la maljunaj sed pli koloriĝitaj. La vizaĝo ruĝiĝita de emocio kiu pligrandigis iliajn okulojn, kaj en ilin ~~[illegible]~~ metis kvazaŭ lumingoj.

# La ŝuldo de Cezaro

## Novelo de Georges d'Esparbès

~

Iun matenon de la 1809a jaro la brava imperiestro promenis kune kun Berthier ku... Princo de Wagram. Ili estis fi... pri Cezaro.

— « Ĉar via Imperia Moŝto kr...
« Roma Estro neniam erari...
« tiun ĉi anekdoton: »

...i rakontas k... oficiro, nomita Sextius ...tro ... a krima legio ~~batis~~ ... Cezaro. Tiu homo estis ...j kaj li estis farinta multajn ...spence. La popolo per la voĉo ... tion scigis en ~~kunveno~~ de la Senato ...idis Cezaron. »

... kio fariĝis Sextius! »

...ro lasis lin en la forgeso por montri ke ...plenumas la ordonojn de l'Senato »

... Cezaro estis malĝusta respondis la Imperiestro ...rekompensema. »

— Marŝante ili alvenis apud regimento kiu faris manovron.

ESPARBES (dit Georges d')
1864 - 1944
Konservisto de Kastelo ~~Fontanbleto~~ FONTENBLO
Verkis historiaĵojn

Tiuj kiam li ekvidis la regnestron la kolonelo ordonis
tamburadon kaj ordigis vice sian militistaron laŭregule.
Sekvate de la Marŝalo, Napoleono eniris en la viciĝ-
Sennerveca Emocio. Meze de tiu homamaso, la
imperiestro marŝis, kvazaŭ en plena soleco inter uniform-
-aro sed ne soldataro, ĉar la kolonoj de homaj palisoj
enterniĝitaj tien, nemoviĝeblaj. Iafoje li haltis apud
unu el tiuj kapoj, sen spiro sen rigardo, sen penso, kaj
observe li rigardadis ĝin.

Poste malrapide, li daŭrigis sian promenon, haltis
ankoraŭ unu sekundon, iafoje unu minuton antaŭ alia
soldato. Poste muta kiel li, Cezaro preterpasis.

Li ekzamenis precipe la maljunulojn. Atente
li serĉis, ĝojne, ĉe tiuj maljunaj vizaĝoj, ian
protestan, ian plendon, ian vorton eble detenitan pro
la disciplino.

Poste, preskaŭ timeme li aliris la junajn vizaĝojn:
li observis la senkrucajn brustojn, la sengalonajn
manikojn, la rekrutojn kiuj jam ne atingis la gloron,
kiuj ne estis pervintaj dom sufiĉe da tempo, sufiĉe da
sango; la junaj tiel altkreskaj, tiel fieraj kiel la
maljunaj sed pli kolorigitaj, la vizaĝo nuĝigita de
emocio kiu pligrandigis iliajn okulojn, kaj en ilin
~~ĵeti~~ metis kvazaŭ lumingoj.

Kontentiĝita Napoleono foriris fine el la reg
kiam subite, dekstre de la grenadista roto de
unua bataliono, apud la tria vico li haltis ant
serĝento, la dekstra gvidisto.

La Imperiestro senmova kun la manoj kontraŭ
dorso, rigardadis tiun homon atenteĝe.

Li sciis parkere pri ĉiuj soldatoj el sia armea
sed en sia imperia memoro li ne retrovis tiun ĉi

Tamen lia vizaĝo estas el tiuj kiuj pensas k
parolas. Se la haroj estas rigidaj, sekaj, sovaĝaj
se kiel urso li havas ĉe la manoj kaj la oreloj,
densajn haretojn, kiuj donas al li ŝajnon de
bruta forto; liaj vangoj kavaj, grizaefraj elmon
emon al pensoj fortaj kaj potencaj. Forte kun
-kontraŭiĝitaj liaj lipoj ne estaj tiuj de ~~stabulo~~, se
de estro. La mentono estas energia; la larĝa
makzelo osto malsupera kaj la rigideco de lia
spino pruvas ke li havas karakteron firman kaj
nefleksebla.

La Imperiestro sin turnis al Berthier

— „Via romana soldato Sextius," li aldiris mallaŭte

Li sanĉeliĝis demandi, eniri mem en tiun animon
subite, kiel kutime li agis. Li revenis kaj aliris
al la kol~~onelo~~:

— « Kiel oni nomas tiun serĝenton, vidu la direkton de
« mia fingro, la gvidiston! »
— « Noel, Via Moŝto
— « Ĉion vi diru al mi pri tiu homo, mallonge. Kiujn militiroj
— « De la tempo de la milito de Vendeo, ĉiujn.
— Armeo de Rhin de Italujo, de Oesto. Li batalis
— ĉe Mantuo, Rivoli, la Favorita, Zurich. Forestanta
« ĉe Maestricht pro vundo, baldaŭ li reaperis ĉe Ulm.
« poste ĉe Austerlitz, Jena, Eylau kaj Friedland. Li
« estas homo modela iom malvarma, sed ŝatata de ĉiuj
« siaj kamaradoj. En garnizono pacience li instruadas ilin.
« sur la batalkampo, energie li kondukas ilin antaŭen.
« De dek jaroj li estas mia ordonito; oftajn fojojn
« mi petis por li la krucon, ĉiam oni forgesis lin. Grandan
« ĝojon mi sentus se Via Moŝto favore ..... »
— « Sufiĉe interrompis la imperiestro; Diru ke
« li venu. »
La maljuna oficiro levis sian glavon: « Serĝento Noel! »
La homo eliris el sia vico, trairis la interspacon de
la batalionoj, marŝante per paŝo de parado,
aŭtomate, kaj haltis antaŭ la imperiestro

— « La epoleton » diris Napoleono
Nenia soleno en la voĉo de Cezaro; la ŝajno de

bona homo kiu pagas, vespere, la salajron de laboristo.

La kolonelo faris signon. La tamburistestro haltigis sian ordonan kanon.

Granda silento regis. Oni estus kredinta ke ĉiuj tiuj homoj estis mortintaj, ke tiu regimento stare frapita de la morto, stare estis restinta.

— « Tamburistoj, malfermu la proklamon! »

La tamburoj ektondris.

— « Serĝentoj, korporaloj, grenadistoj kaj tambur-
« -istoj de mun vi akceptos kiel subleŭtenanto, serĝenton
« Noel'on kaj vi obeos lin pri ĉio kio rilatas la
« militan regularon. — Tamburistoj fermu la
« proklamon. »

La tamburoj ektondris.

Kurbiĝinta sub sia kapoto, klinoĝinta kvazaŭ li meditus, la imperiestro ŝajnis ankoraŭ pli malaltkreska ĉe la interspaco kiu malkuniĝas ambaŭ batalionojn. Subite kaj preskaŭ nevideble, ree li levas sian manon...

Je tiu eta signo kiun li direnis, la kolonelo reekkriis per salto de voĉo tremetanta pro entuziasmo:

— « Tamburistoj malfermu la proklamon!

La tamburoj ektondris.

— « Oficiroj, suboficiroj, korporaloj, grenadistoj kaj

« tamburistoj, de nun vi akceptos kiel leŭtenanto, subleŭtenanton
« Noel'on, kaj vi obeos lin pri ĉio kio rilatas la militan
« regularon. — Tamburistoj fermu la proklamon.»

La tamburoj ektondris.

En la impresa silento, kiu mem ŝajnis silenti; per gesto ĉiam trankvila, la imperiestro realtigis sian manon.

Neniam oni vidis el la ventego kiu skuegas la animon de la regimento, krom tremeto de l'glavo en la mano de la kolonelo, kaj paleco pli kaj pli pala ĉe la buŝo de la homo senmova.

— «Tamburistoj malfermu la proklamon.»

La tamburoj ektondris

— «Oficiroj, suboficiroj, korporaloj, grenadistoj kaj tam-
« buristoj, de nun vi akceptos kiel kapitano, leŭtenanton
« Noel'on, kaj vi obeos lin pri ĉio kio rilatas la
« militan regularon. — Tamburistoj fermu la proklamon.»

La tamburoj ektondris.

Tiam, ĉar la mano de la Imperiestro plu ne moviĝis, la maljuna kolonelo per sia maniko viŝis la ŝviton kiu malsekigis liajn vangojn. Tio sufiĉis. Tia konfeso pri emocio malŝveligis la korojn plenegajn ĝis eksplode. La kolonelo divenis siajn homojn kaj ordonis la disiĝojn de la vicoj.

Tiuj du mil ekkrioj pro entuziasmo ~~[illegible]~~

~~kaj~~ elflugis el batalionoj, kaj amaso da vizaĝoj ruĝaj kaj ~~kriegantaj~~ frenezaj kriegantaj pro ĝojo ĉirkaŭis Napoleonon, ĉiam kurbiĝintan, ĉiam senmovan, ĉiam meditantan...

Ne, sufiĉe, li ne estas farinta ~~sufiĉe~~, tion li sentas Lia justeco ne estas plena.

Per sama marŝado ĉiam trankvila li alvenis al la homo kiu, kvazaŭ elfalinta, sidiĝis sur la seĝon ĉe la kamarado, la pafilo inter siaj kruroj, la mentono sur lia kubuto, la kapo mallevita.

Tiun ĉi fojon ankoraŭ, la Imperiestro ne maltimis alparoli.

Sed li elprenis sian propran krucon, kliniĝis kaj alligis ĝin sur la bruston de la kapitano, ne dirante unu vorton.

La juna oficiro ne levis siajn okulojn. Tamen kiam la Imperiestro restariĝis, li konstatis ke siaj manoj estas malsekigitaj per varmaj larmoj.

Nur tiam, Cezaro komprenis ke li estas paginta la ŝuldon de Cezaro

VIPURO

# La mortigisto de viperoj

Bu-Saada la alĝeria oazo de l'rozujoj, la urbeto de la blindiga suno, Bu Saada estas plena de movo kaj bruo. Sur la granda placo de la palmarboj kie, kutime okazas la vendado, la kameloj forlasitaj, restas kuŝantaj apud sakamasoj da greno.

La arkaĵoj, la butikoj estas senhomaj. Neniu en la maŭroj kafejoj en kiuj estas vendataj la nigra kafo kaj la teo parfumita. La tuta popolamaso aliras antaŭ la policejon. Grupoj formiĝas kaj moviĝas, atendante la mortigiston de serpentoj kies reveno ĵus estas sciigita. Karavano lin renkontis, piede trairantan rapide, la sablajn montetojn amasigitajn kiel remparoj ĉirkaŭ la urbo.

Tre baldaŭ alvenos tra la ebenaĵo de Hodna, Sidi bel Abbes ben Saïd la ĉasisto de viperoj, sen-simila en la Nordafrika lando.

Li aperas de malproksime kiel triumfanto, sekvita de blanka burnusaro. Ĵus li trairis la tridek-kvin kilometrojn kiuj malkunigas Bu-Saada de la gento Ĝabel kie li loĝas. La ĉiea atendo ne estos trompata, ĉar li kunportas sur sia dorso la ĉasaĵon de dek-kvin tagoj; du

ŝafledajn sakojn plenajn de viperoj afrikaj kolektitaj
unu post alia ĉe la dezerto.

Kurioza homo tiu Sidi Bel Abbes! Malgranda kvadrata en sia blanka burnuso, la vizaĝo bronzumita la barbo mallonga. Lia okulo vigla, inteligenta, energia esprimas la kuraĝon, la decidon kiujn li bezonas por sia danĝerega ~~profesio~~. metio.

Li ne ŝtelas certe la duonon da franko po ĉiu vipero, al li aljuĝita de la rega administracio, kiu cetere altrudas limon al liaj kuraĝaj agoj, ne elspezante ĉiujare, pli ol kvin cent frankojn.

Oni rakontas, pri tiu kuraĝulo, farojn indajn je Spartano aŭ Romano de la unuaj epokoj, ĉar la ĉaso ofte estas drama. Kiam la vipero jus mordis homan estaĵon, grandaj saĝeco, prudenco kaj decideco estas necesegaj. Nenia ŝanceliĝo. La heroa rimedo aŭ la fulmofrapa morto.

Kiel tio estis okazonta, Sidi bel Abbes estis pikita kelkajn fojojn, sed la risorto de lia volo subite ekpuŝita ĉiam savis lin. Unufoje li elŝiris per siaj dentoj, eron de sia manplato. Li havas sur la maldekstra ~~[illegible]~~ dika fingro la signon de sekco, de si mem rapidege farita kun, li kovris je ĉaspulvo kaj ekbruligis poste

por kaŭterizi la vundon...

×××

Aliaj klimatoj, aliaj moroj por la ornamitaj viperoj afrikaj. Ili ne alvenas frostsentemaj varmiĝi sub la suno kaj kuŝiĝi apatie sur la teron kiel la nigraj viperoj de la francolandaj arbaroj. Male ili atendas la subiron de la suno kaj eliras el ilia rifuĝejo nur vespere, kiam malvarmetiĝas.

Tiam ili rampadas la tutan nokton, frotiĝante unuj kontraŭ l'aliajn kaj markante sur la flavan sablon de l'dezerto, la signon de siaj interplektitaj korpaj ringoj. Fine je la tagiĝo, laciĝitaj de sia nokta kurado, ili haltas sub iaj arbetaĵoj por esti ŝirmataj kontraŭ la suno. Ĉe tiuj lokoj kutime la ĉasisto ilin serĉas kaj eltrovas. Aliajn fojojn kuŝiĝinte teren, li observas la eliron el iliaj truoj fositaj en la sablo, kaj ilin ekkaptas je la kolo per preniloj aŭ, io danĝeraga, per sia mano.

Por la leono estis nur unu Julio Gérardo en Alĝerio, por la pantero unu Bombonel, por la vipero, ĝisnune oni konas nur unu Sidi Bel-Abbes'on. Kiam li estis malaperinta — kaj li ĉasas de dek-du jaroj — kredeble li ne estos anstataŭata. Lia rolo, malgraŭ sia profito, ne

nombrajn konkurantojn.

× × ×

Tamen honrondo estas formita de la Araboj. Ĉe la centro de la grupo, plenlume, staras du homoj, unu estas enlanda policano kun blanka turbano, l'alia, la kuraĝa Sidi bel Abbes

Lerta artisto, tiu ĉi zorge agas antaŭ la reprezent-anto de la aŭtoritatoj, kaj la scivolema vidantaro kiu lin ĉirkaŭas kaj admiras iom timeme.

La brava ĉarmisto unue duonmalfermas malrapide sian sakon. Tuj kiam aperas kapo de eliranta vipero, rapide li ekkaptas ĝin ĉe la gorĝo. Ĝin premas per siaj fingroj kiel en ferpremilego kaj subite ĝin eltiras eksteren. Dum la serpento baraktas li ludas kun ĝi kiel kato kun muso, ĝin alparolas, alfaras komplimentojn, aldonas ironiaj-etajn nomojn. Poste kiam sufiĉe li ridis, per forta bato de sia bastono, li rompas la spinon al la kaptito.

Aliajn fojojn li almetas teren sian mortigoton. Tiam la Araboj ekdisiĝas aŭ forkuras timigitaj. Sed per preneto da flartabako ĵetita sur la okulojn de l'terura rampaĵo li blindigas ĝin kaj per fortega kalkanuma bato li premegas

ĝian kapon.

Je tiu vidaĵo, la kruelego de la Araboj ekvekiĝas. La malnova tradicio de Islamo reaperas, laŭ kiu, ĉiam oni devas detranĉi la kapon de sia malamiko por certiĝi pri ĝia morto. Oni eltiras la tranĉilojn kaj sendanĝere por la ekzekutantoj la buĉado de la Bu-Lefaa[1] komencas....

Sed estas necese pensi pri la seriozaj aferoj.

Kiom da viperoj kuŝas disĵetitaj teren. La policano kalkulas unu post unu. Du cent dek-kvin, li diras

Kaj Sidi bel Abbes kontentigita estas tuj ironta en la policejon por ricevi la gajnitan monpremion kiam, oficisto de la milita kunvenejo alvenas lin.

La estro de l'teritorio de Bu Sraada, milite administrata, jus eksciis pri la alveno de la fama ĉasisto, kaj li dezirus ke siaj multaj gegastoj, esploristoj kaj turistoj, ĉeestus neordinaran vidaĵon; la mortigan dubatalon de kornporta vipero kun urano[2] de la dezerto.

Por tion organizi Bel Abbes fariĝis majstro.

Tamen li ŝanceliĝas ĉar li diras ke de multaj jaroj tion li ne faris. Tiam por lin deciigi, la sendito flatas lian memestimon, promesas donacon kaj fine la Arabo akceptas gvidadi la batalon.

(1) Araba nomo de la vipero — (2) Araba nomo de granda lacerto.

Li havas ankoraŭ en sia sako por siaj klientoj naturistoj, kelkajn el siaj plej belaj viperoj, dikaj. longaj kaj malbonaj ankaŭ. Li petas nur limtempon ĝis la morgaŭa tago por eltrovi nokte grandan varanon ĉe la proksimaj sablaj montetoj.

La organizado de l'spektaklo estas simpla. Ĝi okazas en la ĝardeno de la militoficira kunvenejo plena de rozoj, parfumita de geranioj, sub ombraĵo de palmarboj, morusarboj kaj grandegaj figarboj. Ĉe la mezo, marmoraj tabloj kuŝigitaj kaj ronde metitaj formas artefaritan fosaĵon.

La geinvititoj sin lokas stare, ĉirkaŭ tiun arenon, la sinjorinoj sur benkojn por pli bone vidi kaj ankaŭ pro timo de la danĝera besto. La estro de la tiea militistaro kun sia leŭtenanto prezidas la kunvenon.

Vera kunvenaro de unua prezentado ĉe la dezerto Inter la altrangaj arabaj estroj, la bruna aga'o [1] de la regiono kiu, afabla, distinginda, ridetas montrante siajn blankajn dentojn, dum apud li la kaid'o [2] kaj la kadi'o [3] de Bu Saada interparolas kun francaj oficiroj

Atendante la tri tradiciajn batojn, oni interparolas pri bataloj de bestoj tre ŝatataj de la Angloj kaj

(1) Araba estro (2) Araba estro. Suraga'o (3) Araba juĝisto.

de la Hispanoj, dueloj de kokoj armitaj de ŝtalaj sprong̃, bataloj de hundoj kaj grandegaj katoj......

* * *

Estas la dua horo. La suno alsendas siajn plej varmajn radiojn. Sidi bel Abbes milite akurata, faras sensacian aperon.

Li zorgis ĉirkaŭi per sufiĉe longa ŝnuro la renojn de granda urano kaptitan la lastan nokton ĉe la dezerto, kaj li metas ĝin mirigatan, sur la batalejon. Poste li eltiras el sia leda sako, ankaŭ grandan viperon vere elektitan inter la plej timegindaj kaj ĵetas ĝin sur la sablon de l'areno.

Unue la du batalontoj restas ĉe sia propra loko kvazaŭ ĉiu estus sola. La vipero restas senmova. La urano kontraŭflanken rigardas. La unu kaj l'alia, ŝajne, timas malpravigi sin komencante la batalon, tiel la ĝuvidantoj havas sufiĉe da tempo por ilin rigardi kaj studi ilian fizionomion.

La urano, unua okupanto de l'batalkampo estas granda lacerto de la dezerto, la "varanus arenarius" de la naturistoj, la lacerto de la palmarbaroj por la aliaj. Longa pli ol unu metro, tiel maltiminda kiel siaj etaj simuluoj, preskaŭ ne naiva la amiko de l'homo ĝi havas viglajn okuletojn, borderitajn de rozkoloraj

palpebroj, buŝon larĝe fenditan, haŭton grizan kvadrilitan kiel fajlilo, la ventron blanka, mallongajn piedetojn forkajn kaj ungojn pintajn kaj hokajn. Ĝia vosto pli longa ol la korpo finiĝas pinte. Pro la nombraj kaj akraj dentoj el sia makzelo, ĝi ŝajnas miniatura krokodilo, sed neniom ĝi havas el ĝia krueleco.
Kiam ĝi militas kontraŭ la serpento, ĉiam tiu ĉi estis la unua atakanto.

Dum tiu ĉi momento ĝi tre volus esti ekstere kaj reiri sian rifuĝejon. Ĝi penas eksalti eksteren sed vane. La ŝnuro volvita ĉirkaŭ ĝia korpo malebligas ĝian forkuron; la ĉasisto perforte ĝin rekondukas sur l'arenon por la batalo.

Ĝia malamiko estas el la plej danĝera speco. Tiu terura vipero de Afriklando, la "cerastes egyptiacus" aŭ "cornutus" havas la kapon plata[x] kaj triangul-forma, la ĉirkaŭaĵon de ĝia buŝego dika kaj mallonga la dentojn pintegaj; ĝi portas sur la kapo du kornojn kiuj povas eniri aŭ eliri laŭvole. La korna vipero havas la korpon grizsafra, samkolora kiel la sablo de la dezerto kaj pro tio, ofte ĝi estas nevidebla sur la ora pulvo. Ĝi estis prezentita de la Praegyptoj inter iliaj hieroglifaj signoj kaj iam skulptitaj sur iliaj obeliskoj kaj la kolonaj de

[x] il a la tête comme plate.
Commentaire page 116

la temploj.......

Sed la du kontraŭuloj sin ekrigardas reciproke. Ĉiuj okuloj ~~rigardoj~~ sur ilin estas direktataj. Solena estas la momento.

La vipero ekfajfas, kaj por pli bone eksaltigi sian kapon antaŭen, ĝi kunmetas siajn korpajn ringojn helikforme kiel horloĝa risorto. Kiu do diris ke ĝi estas blinda kaj surda? L'urano ĵetas rigardojn dekstren kaj maldekstren. Ĉiuj kojnaj dentoj aperas en ĝia malfermita makzelo. La vipero tuj eksaltas sed l'urano al ĝi ne lasas tempon. Ĝi ekfaras unu salton, ekkaptas la serpenton per fortega makzela bato, kaj ĝin detenas je la mezo de ĝia korpo.

Incitata de la doloro, la vipero malfermas sian flamigitan buŝegon kaj per multegaj movoj kaj skuoj ĝi penas liberiĝi, kaj mordadas la lacerton. Baldaŭ la sango ĉien disfluas, sed la urano ne ellasas sian kaptaĵon kies spinon ĝi intencas rompi.

Fine blindigita de sango kaj lacco, l'urano malfer-mas sian makzelon kaj ellasas sian rimditan mal-amikon, kiu, nune duonmorta kuŝas senmova tere.

Ĉu ĉio estas finita? tute ne. Ĉio estas nur la unua parto de stranga turniro. Pli sciamaj ol iam la gevidantoj alproksimiĝas, atendante la sekvon de tiu mortiga duelo pli kaj pli interesa. La interrompo estas maldaŭra.

Tom post ĉiu la perfida serpento reviviĝas. Unue ĝi havas nur spasmajn movojn; poste la malamo, la venĝemo al ĝi redonas novajn fortojn. Ĝi ekstariĝas sian kapon sur kiu ĝiaj du kornoj rigidaj ŝajnas du minacaj lancoj. Akrege ĝi fajfas pro furiozeco kaj ĝia buŝego larĝege malfermita elmontras ĝiajn du danĝeregajn dentojn el kiuj elfluas la mortiga veneno.

Baldaŭ ĝi alrampas al sia kontraŭbatalanto; subite sin kroĉiĝas al ĝi, denove ĝin mordas ĉe la molajn partojn de ĝia gorĝo, penante atingi ĝiajn okulojn por elin krevi, sed vane.

La vipero tiele estas vere terura.

Nun la granda lacerto de l' dezerto spiregas ĉar siaj vundoj multege ĝin doloras. Ĝi sentas ke tute ĝi malfortiĝas, tial estas necese rapide provi venki. Ĝi sukcesas liberiĝi, iom malproksimiĝas, poste per rapida antaŭensalto sin ĵetas sur sian malamikon, ekkaptas ĝian triangulformon kapon inter siaj makzeloj kaj fortege ĝin premegas.

La serpento tiel rato kaptita en kaptilo, mal-espere penadas por eliri. Sian voston furioze ĝi svingas kiu nervege batas aeron. Novan fojon l'urano malfermas sian buŝegon kaj ellasas sian

malamikon. Poste trenante makrapide sian ventron kaj sian voston sur la tero ĝi aliras rifuĝi en angulon.

La batalo ĉesas pro manko de batalantoj. La vipero plu ne fajfas, furioza ĝi blovas; la krio pri militado fariĝis la spasmo de l'agonio. Ĉeflanke la Araboj ekkrias franemalbone: « L'urano li gajnas, l'urano li gajnas.»

Pakte la brava lacerto kredas ke ĝi donis la mortigan baton al sia mortigato. Kiel vunditoj kiuj la soifo sekigas, ĝi elirigas sian langon forkan, longan je duonfuto kaj ĉar li sentas ke sia rolo estas finita, ree ĝi provas eksalti trans la marmorajn murojn de la batalejo por alkuri la dezerton. Sed Sidi Bel Abbes ne donas. Per rapide ektiro de la ŝnuro li haltas ĝin kaj ĝin detenas kaptite.

Tiam la vipero duonmorta levas sian kapon kaj ĵetas alian minacan blovon. Kolere tiun ĉi fojon l'urano ĝin rigardas kaj jen la lasta akto de l'dramo. Senatende la lacerto, certe reekkaptas sian malamikon je la kapo, fortege ĝin skuas, rompas ĝiajn vertebrojn, finas mortigi ĝin per superega peno kaj furioze ĵetas ĝin tiom malproksimen kiom ĝi povas.

Tiun la rampinta besto plu ne movas. Ĝi estas nur malvivulo kaj jam super ĝi turniĝadas verdaj muŝoj.

La batalo daŭris pli ol unu horon.

Kvankam preskaŭ ĉiam tiuj dueloj finiĝas per

la venko de la lacerto, nevenenigebla per la vipera veneno kiu tamen fulmofrape mortigas la homojn, tiu sporto estas vere vidinda kaj tute neordinara.

Dum la geridintoj disiĝas interŝanĝante parole siajn impresojn, Sidi Bel Abbes trankvile ricevas la monon kondiĉitan. Li remetas poste siajn viperojn sur sian ŝultron kaj sin preparas por reiri la vastajn sablajn ebenaĵojn el kiuj li elvenis kaj kie, novaj danĝeroj lin atendas.

Traivinte la urbeton Bu-Saada, la mortigisto de serpentoj fine malaperas. Baldaŭ li estos ĉe tiuj spacegoj senfinaj kaj senombraj kie li ĉasadas.

Kiam li revenos? Ĉu iam oni revidos lin? —

Kiu scios!

Ofte la dezerto ne redonas tiujn kiuj ne timis travizitadi ĝin.

7808 6909

Ĉiu libro estis skribitas
de instruisto kiu profesis
en Algerio, elle en la komenco
de la jarcento.
familiana donacis ĝin, jam
longtempe...

mari de sa sœur

amie de mme. Voisin ~~sa belle-sœur~~ sa

Jean sa sœur / son beau-frère

- aurait écrit +

- donné à Melle Ogé - après 45

+

# A. Daudet

Vespero en Arabolando

KUITAJ

Ambicia sed [illegible]

Diablo kaj la bela Zazio

Mesaĝo

25 La Papo Mortis (A D

Sonĝoĉasisto (A. Brassac / Grosu ?)

Tubflano (A Dellas

MEKTUB

39 La Ĉasisto de Algero

Lehonsangusto ondanto

La Tabako (A Kar

La Juro de Halmo

83 La Auldo de Cezaro

83 - La mortigisto de Vepouy

Manuskripto donacita la 12/88 de Paulette Ogi
(Vidu la aldonitajn kartojn

---

E- Carte de A. Bassac el Konstantino = MEKTUB
(vidu eltranĉaĵon

---

Samtitolaj ~~novel~~ noveloj :

A. Daudet La Papo Mortis – trad. de Bassac
Sub. Titolo "Papo mortis" The Esperantist 1905/10

A Daudet Dekoracio Augusto Ordenito
trad. de Bassac – Alĝera Stelo 1906/1

## « Mektub »

## El la alĝeria virina vivado.

Krom senfoliigi jasmenon kaj pisti florfolietojn de rozoj inter siaj apatiaj fingroj, Jamina nenion faris.

Tamen ŝi estis malriĉa kaj, ĝis nun, ŝi iradis laŭ sia ritma irado, helpadis sian maljunan patrinon en ŝiaj hejmaj laboroj nur vestita per vesto el katuno kaj alia vestaĵo, arabe nomita « futa », kvazaŭa ĉemizo, ĉiam malligita.

Tiuj vestaĵoj, apenaŭ sufiĉaj, ne kaŝis la koloron kvazaŭ flaman kaj sukcenan de ŝia karno ; kaj ŝiaj virinaj formoj aperis firmaj, klasikaj kaj modelaj. L'aŭreolo de ŝiaj haroj, nature blondaj sed kolorigitaj, dismetitaj de la blovo, la dubeblua ĉirkaŭo de ŝiaj grandaj avidaj okuloj, precipe la lumeto, kiu ŝprucis el ili, igis ŝin stranga kaj enigma kreitaĵo.

Apud ŝi la atmosfero estis parfumata de jasmeno aŭ geranio, kaj alvenis al ni kvazaŭ plenigita je amo kaj voluptaĵoj.

Ĝis nun, la vizaĝo de Jamina havis tiun harmonion de la frunto kaj de la okuloj, kiu atestas internan radiadon. Komprenebl e ŝia animo kaj ŝiaj ecoj estis ankoraŭ embriaj kaj senmovaj, ĉar Allah (1) kreis por la servuteco kaj la sklaveco ŝian rason, ĉiam kurbiĝantan al la tero por labori, neniam stariĝantan al la ĉielo por pensi. Sed, fine, la radiado de l' rigardo, tiu « fiat lux » de la inteligenteco estis brila, precipe pro la ĝojo, ke ŝi estas bela, ke ŝi estas juna.

. . .

Nune la granda alloga potenco, kiu elvenis el ŝi, plu ne ekzistas, ŝi ŝajnas defalinta diaĵo ; ŝia rigardo estas vualita de ia ombro ; ŝiaj longaj brovoj, ĉiam mallevitaj nune, ne plu havas tiun vivecon, kiu karesis la animon.

Jamina, senmova sur siaj molaj kusenoj ore broditaj, restas tie, nepenetrebla kaj mistera, kiel la sablo de sia dezerto.

De tempo al tempo, skuita de laceco, kiu havas ion sovaĝan, siajn graciegajn brakojn konvulsie ŝi levas super sian kapon, dum el ŝia gorĝo eliras sonoj strangaj, kiel la bojo de l' ŝakalo en la soleco.

Anstataŭ sia rido kaj sia ĝojeco, Jamina portas, lutitajn ĉe la lipo, gluitajn ĉe la frunto, ĉe tempioj, sur siaj vangoj, la mentono, orajn brilaĵetojn kvaronlunformajn.

Etaj bonodorujoj pendas ĉe ŝia kolo, enmiksitaj kun strangaj pendaĵetoj. Ŝiaj haroj estas en ordo kunligitaj per rubandoj helkoloraj, semitaj je dikaj perlamotaĵoj. Ŝia vesto ne plu estas el katuno, sed el silko arĝente brodita ; ŝia ĉemizo el maldika, nepalpebla gazo, kaj ŝiaj pantofloj, tro grandaj por ŝiaj etaj piedoj, elmontras apud ŝi siajn brilajn oraĵojn.

Ĉio tio, ĉar la araba virgulino baldaŭ edziniĝos je fiera kaj riĉa estro ; tial ŝi ne plu laboras. Ŝi okupas sin, nur parfumante sian korpon, ŝmirante ĝin je plej bonaj odoraĵoj. Ŝi preparas sin laŭ la mahometana kutimo, por iĝi inda je sia edzo, kiam ŝi transiros lian pordon.

La tutan tagon, ŝiaj kunulinoj, junaj kaj maljunaj, ŝin vizitadas. La maljunaj, pli malpli kurbiĝintaj kaj velkintaj, malŝparas la konsilojn de sia malnova sperto, dum la junaj eltiras el kesteto la pezajn juvelojn ĉizitajn, ilin palpadas, ilin rigardadas per duonenviema okulo. Kaj la tutan tagon, murmuradoj, zumadoj, pepadoj miksitaj kun gorĝaj ekkrioj, plenigadas la malgrandan ĉambron ĉirkaŭitan de kolonareto, poste forflugas eksteren per ĝojaj bruoj.

La preteriranto haltas sciema, kaj aŭskultas momente tiun alfluon kaj defluon de virinaj voĉoj.

Meze de tiu gajeco, kial do Jamina estas malgaja ? Ja ŝi ne konas sian fianĉon, sed ĉu ŝi ne scias, ke ŝia patrino, post multaj interparoladoj, vendis ŝin altpreze al malŝparema sed malbela maljunulo, al kiu oni laŭdis ŝian junecon, ŝiajn ĉarmojn, ŝian belecon. Ĉu jam li ne elspezis la duonon de l' monprezo kondiĉita sur la kontrakto, promesante, ke li elpagos la lastan parton, tuj kiam li ne povos plu dubi, ke ŝi estas tiel bela, kiel oni certigis al li.

Sed ne ! Jamina estas nek malgaja nek gaja ; ŝi estas nur la ilo indiferenta kaj pasiva de la sorto, la ludilo de l' fatalo. Ŝia sorto plenumiĝas.

Tiun ĉi tagon mi estis alveninta ŝian hejmon kune kun kelkaj vizitantinoj, por ŝin gratuli. Ho ve ! tiuj pezaj ĉirkaŭkruroj ĉe ŝiaj maleoloj ŝajnis al mi katenaĵoj de sklavo ; ŝiaj kapjuveloj sur la frunto, la signo de la servuteco ; ŝiaj oraĵetoj sur la vangoj, la neforigebla makulo de la groteskeco tra la jarcentoj. Ĉio tio tedis min kiel la esprimo de nevenkebla barbareco. Tiuj juvelujoj hodiaŭ ornamitaj, mi diris al mi, morgaŭ kondukotaj per vipbatoj, neniam estos pretaj por la liberiĝo ; neniam alvenos la horo por la virino de Oriento !.... kaj sincere mi laŭte ekkompatis ŝin.

Unue ŝi ridetis, poste refariĝis serioza, kaj levante sian dekstran manon ŝarĝitan je pezaj metalaĵoj, ŝi respondis grave : « *Mektub Rebbi* », Dio tion volas.

*De* A. Baissac,
*el* Konstantino (Alĝerio).

(*1*) *Araba nomo de Dio.*

mari de ~~sa sœur~~ sœur

amie de mme. (Voisin) ~~sa belle~~ sa

pour sa sœur / son beau-frère

-aurait écrit +

-donné à Melle Ogé – après 45

+

se faire à tenir un

magasin de vaisselle

angle rue Longue et Hotel de Ville

(Trianon) (maintenant CMP)